



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Julio 2018 n-ro: 31



Merhaba,

Temmuz ayı dergisi ile gene birlikteyiz. Bu ay çok önemli çünkü ay sonunda Portekiz Lizbon'da Uluslararası Esperanto Kongresi (UK) düzenlenecek ve önümüzdeki yıllar için Esperanto stratejisi belirlenecek.

Bu sayımızda da gene çok ilginç yazılarla karşınızdayız. Bir çok kısa, sizi yormadan okuyabileceğiniz yazının yanında daha uzun yazılar da var. Mesela Yunan mitolojisinden Orfeo, Arnavutluk'tan Adil Olluri'nin bir hikayesi, ve Fransa'dan Irène Némirovsky 'nin romanından ikinci bölüm. Felsefe tarihinden Friedrich Nietzsche. Danimarka'dan Yüzüklerin Efendisi yazarı Tolkien hakkında bir yazı. Çin'den PDF ve EPUB formatlarını karşılaştıran bi yazı. Esperanto dünyasındaki kitap basımına dair istatistikler. Bilimsel yazılar, haberler, dilbilgisi, şiirler vs gibi okuyabileceğiniz farklı karakterde bir çok makale mevcut.

Unutmayın okumadan ve bir şeyler yazmadan bir dilin öğrenilmesi mümkün değildir. Sonraki sayıda buluşmak üzere,

Hepinize iyi okumalar!

Saluton,


Ni denove estas kune kun vi pere de nia julia numero. En julio estas grava organizo en Lizbono, Portugalio: la Universala Kongreso en kiu oni decidos pri la strategio en Esperanto por la venontaj jaroj.

En ĉi tiu numero vi denove trovos diversajn kaj tre interesajn artikolojn. Estas multaj mallongaj tekstoj, kiujn vi povos legi senlacigante kaj ankaŭ aliaj pli longaj artikoloj. Ekzemple rakonto pri Orfeo el la greka mitologio, kaj rakonto de Adil Olluri el Albanio. La dua parto de la romano de Irène Némirovsky el Francio. Friedrich Nietzsche en la monda filozofia historio. Artikolo pri Tolkien, la verkisto de la "Majstro de l'Ringoj", el Danio. Artikolo el Ĉinio kiu komparas la formatojn PDF kaj EPUB. Artikolo kun statistikoj pri la libro produktado en Esperantujo. Kaj multaj aliaj artikoloj kun diversaj temoj, ekzemple artikoloj pri scienco, novaĵoj, gramatikaĵoj, poemoj ktp.

Ne forgesu, ke sen legado kaj skribado ne estas eble lerni lingvon. Ĝis nia venonta numero.

Bonan legadon al ĉiuj!

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



www.CDELI.org

RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:

Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Pasaporta Servo	2
Esperanto Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leterojn ni ricevis el geamikoj	4
La Internacia Vojo ESPERANTO	4
Inteligentaj Birdoj	5
Esperanto	5
Kiel Junigi la Movadon	6
Pri "Vesperto" Literaturaj Folioj	7
ORFEO (ΟΡΦΕΥΣ)	8
La blej belaj okazaĵoj pri birdoj (parto 4)	10
La Portanto de la forpelitaj animoj	11
El la libro de "Dao de Jing" (23)	14
Facilaj Rakontoj	14
Antaŭ la pentraĵoj de Iglia Besson	15
La Aŭtunaj Muŝoj (parto 2)	15
Mallonga Historio de Filozofio (30)	17
Ŝercoj	18
La Pigra Kato (fabelo)	18
Kurcvortenigmo	19
La "sekreta malvirto" de Tolkien	20
PDF libro bela sed ne oportuna	21
Nia libro produktado en la plej mallonga jaro	22
Kalendaro el rokoj	24
Reĝa ordeno por Rob Moerbek	26
Esperanto en Brazilio	27
La imperfekta tempo	27
Esperanto Tago (TR)	28
Denaskaj rakontetoj	29
Kelkaj sugestoj por la malliberigotoj	30
Eŭropa Junulara Evento (EJO) en Strasburgo	31
Io okazas en la Zaozhuanga Universitato	32
Solvo de la krucvortenigmo	32

Kursoj



Pro la somera sezono nun estas neniu aktiva Esperanto kurso en Turkujo.

Pri Pasaporta Servo

Nova serĉilo kaj... mapo! (30/9/2017)

Post monatoj da laboro pri geografia sistemo, ni ĝoje anoncas du novaĵojn: la novan serĉilon kaj la mondmapon!

La nova serĉilo ne plu montros nur la gastigantojn ene de la urbo aŭ lando kiun vi elektis, sed ankaŭ la plej proksimajn de tiu loko. Pro tio vi ĉiam ricevos rezultojn, eĉ se la plej proksima gastiganto estas 2000 km-ojn for de via serĉpeto.

La plej gastigemaj gastigantoj certe ĝojos esti pli troveblaj!

Kaj la tre atendita kaj petata funkciaĵo estas la monda mapo! Nepre malkovru ĝin kaj esploru.

Post ses jaroj, la libreto revenas! (25/4/2017)

Post ses jaroj da atendado kaj monatoj da laboro, la PS-libreto 2017 estas akirebla ĉe la libroservo de UEA!

Tiu ĉi eldono enhavas 974 adresojn el 81 landoj.

Kiel uzi?

1 • Serĉu taŭgan gastiganton: Eblas serĉi laŭ urbo, regiono aŭ lando, en Esperanto aŭ nacia lingvo. Vi bezonas krei konton por vidi pli da informoj.

2 • Kontakti la gastiganton: Uzu la mesaĝsistemon por komuniki. Vi povas peti pli da informoj tiam, ankaŭ retadreson aŭ telefonnumeron...

3 • Interkonsentu. Legu la kondiĉojn kaj decidu ĉu taŭgus por vi.

4 • Vojaĝu kaj travivu Esperantajn spertojn. Ne forgesu kontakti la gastiganton antaŭ alveni! Vi eble dezirus kunporti donacon por via gastiganto...?

Pasporta Servo

Esperantaj gastigantoj tra la mondo

Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj

landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



Karaj, dankon pro via partopreno en la maja sumoo.

335 homoj el 33 landoj partoprenis kaj

sukcese finiĝis la maja sumoo. La nombro de la partoprenantoj estis je 30 homoj pli multaj ol en marto, dank' al multiĝintaj brazilanoj (21 → 35 homoj) kaj reveno de sviasaj gelernantoj.

Julia sumoo

En julio okazos la julia sumoo ekde la 1-a de julio ĝis la 8-a (8 tagoj). En julio okazos diversaj Esperanto-eventoj kaj multaj estos okupitaj, do ni havos nur 8-tagan sumoon. Mi atendas vian partoprenon.

Pri nia retejo

Nun nia retejo ial malaperis. Tre stranga afero okazis. Nun Krystyna, respondeculino de la retejo, demandas de la kompanio. Mi esperas, ke baldaŭ la problemo solviĝos.

Jen la nova ret-adeso de nia retejo: <http://www.esperanto-sumoo.pl/>

Sumoo-kunsidoj en la UK

En la UK en Lisbono ni havos sumoo-kunsidon du-foje; en dimanĉo, la unua tago, post Inaŭguro kaj en vendredo. Dum tiuj 6 tagoj ni havu "Dum-UK-sumoon". En la unua kunsido ni registru nin, kaj ĉiun tagon ni mem enskribu nian rezulton en la listo ie metita, kaj en la fina kunsido ni interŝanĝu informojn pri la legitaj libroj.

* Vi kunportu librojn legindajn kaj interŝanĝu ilin en la kunsidoj.



HORI Jasuo
organizanto de la Esperanto Sumoo

UEA



N-ro 738 (2018-06-17)
UEA alvokas okaze de la Monda Tago de Rifuĝintoj

Unuiĝintaj Nacioj nomis la 20-an de junio Monda Tago de Rifuĝintoj. Ĉi-tage ni aparte memoras la multajn milionojn da homoj forigitaj el siaj hejmoj pro milito, perforto kaj naturaj katastrofoj. Universala Esperanto-Asocio solidariĝas kun multaj aliaj organizaĵoj por atentigi pri la neceso de internacia kunlaboro por alfronti la bezonojn de rifuĝintoj kaj labori por ilia paca kaj sekura reiro al siaj originalaj loĝlokoj, aŭ ilia azilo en la landoj kie ili, senelekte kaj senkulpe, troviĝas. [...]

N-ro 737 (2018-06-13)

Kiel enmovadigi la Esperanto-lernantojn de Duolingo?

Pli ol 1,7 milionoj da homoj eklernis Esperanton per Duolingo. Sed kie estas tiuj lernantoj? Multaj el ili eble rezignas pri la lernado pro multaj kaŭzoj, interalie, ĉar ili ne sukcesis starigi personan kontakton kaj amikecan rilaton kun esperantistoj en siaj loĝurboj. [...]

N-ro 736 (2018-05-25)

UEA elektiĝis en gvidan neregistaran grupon ĉe Unuiĝintaj Nacioj

Rezulte de diplomaciaj elpaŝoj en Novjorko kaj Ĝenevo, UEA elektiĝis por trijara periodo en la estraron de internacia kunordiga grupo de neregistaraj organizoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj, konata per la mallongigo CoNGO (pron. "kongo") [...]

TEJO



Partoprenu trejnadon pri egaleco dum IJK en Badajoz

Dum la #IJK2018 – Internacia Junulara Kongreso en Badajoz, okcidenta Hispanio, kadre de la Erasmus+ projekto Florigu Egalecon inter Junuloj (FEJ), okazos trejnado pri egaleco. En Esperantujo, same kiel en la socio, homoj spertas malegalecon surbaze de siaj diversaj ecoj kaj identecoj. La celo de ĉi tiu trejnado estos malfermi la temon, detale pridiskuti ĝin, kaj edukiĝi por [...]

Malferma alvoko: Iĝu TEJO-estrarano 2018/2019

La Estraro estas la ĉefa plenuma instanco de TEJO. Ordinare, novaj estraranoj estas elektitaj okaze de la ĉefa kunveno de la Komitato dum la Internacia Junulara Kongreso, kiu ĉi-jare okazos en Badaĥozo (Hispanujo) de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto. Kandidato por iĝi estrarano de TEJO devas esti individua membro de TEJO en 2018 [...]

Estrara Kunsido de TEJO en Hannover

Estrara Kunsido de TEJO okazis en Hannover, Germanio. La estraro pritraktis la realigplanon, resumis ĉiujn faritaĵojn de la pasintaj monatoj kaj planis la farendaĵojn por la venontaj. La kunsidon partoprenis ankaŭ la du novaj estraranoj de TEJO: Cyprien Guiya kaj Marc Konijnenberg (rete). La estraro enkondukis Cyprien surloke al multe da fakoj kaj informoj. La [...]



Leterojn ni ricevis el geamikoj



Hola! mi atendas ĉiam pli senpacience la aperon de via revuo, kiu estas tiel riĉohava! Dankon! Ankaŭ pro publikigo de rakonto de Adil Olluri.

Bardhyl Selimi, el Albanujo



Kara sinjoro,

Kun granda ĝojo mi ricevis la novan numeron de la gazeto Turka Stelo. Jes, granda ĝojo, vere granda ĝojo, ĉar vi liveris la epub-version apud la pdf-versio! La Turka Stelo ne estas la unua Esperanta gazeto kun epub-formo, sed ĝi estas unu el la malmultegaj Esperantaj gazetoj kun epub-formo!

Mi devas konfesi, ke la pdf-formo estas pli bela ol la epub-formo, sed mi neniam legas kompletan artikolon en pdf-gazeto! Ĉar mi ne ŝatas long-tempe sidi antaŭ ekrano por zorge legi artikolojn. Ĝenerale mi kopias gazetojn aŭ artikolojn al elektronika legilo aŭ poŝtelefono, por legi kuŝante en lito. Kvankam mi estas membro kun revuo de UEA, sed mi preskaŭ neniam legas artikolojn en la revuo Esperanto. Mi kotizas por UEA nur por subteni ĝin.

Ricevinte gazeton Turaka Stelo numero 29, mi tuj kopiis ĝin al mia legilo, per kiu mi legis kelkajn artikolojn en tiu gazeto.

Krome vi skribis, ke oni bezonas 3 - 4 minutojn por malfermi gazeton de epub-formo. Sed en malnova poŝtelefono mi bezonas nur 2 sekundojn por malfermi la gazeton (kaj en la dua fojo nur 0,5 sekundon). Mia legilo en la poŝtelefono estas FBReader. En legilo

aĉetita antaŭ 6 jaroj, mi bezonas nur malpli ol unu sekundon por malfermi ĝin.

Laste, mi refoje kore dankas al vi, kaj kore dankas formon Epub!

Solis, el Ĉinio

Saluton estimata Turka Stelo !

Mi ne rediros, tion kion aliaj jam pli bone ol mi diris kaj rediris pri la belo, la intereseco kaj varieco de la revuo.

Mi nur rimarkigos ĉifoje, kiom mi aprezis la artikolon pri urbeto en Finnlando (Hyvinkää), kiu montras, kial pluraj aliaj, fakte iel ĉiuj, artikoloj, kiom interesa kaj valora estas tia revuo, kiu malkovrigas "per la malgrandaj okulvitroj" la diversecon de konkretajn vivojn en ĉiuj anguloj de la mondo, kaj dum ĉiuj jarcentoj. Vere viveca mergado en tiun urbeton de Finnlando, kaj per ĝi en Finnlandon mem, kaj malkovrigas aferojn ĝenerale nekonataj en la aliaj landoj, foje tre malĝuste, ĉar povas esti gravaj disvolviĝoj de Historio. Ekzemple la enlanda sociala milito, kiu okazis en Finnlando en 1918, pri kiu la historilibroj tute ne parolis (mi malkovris tion nur freŝe kaj nur ĉar mi multe krozas sur interreto, dum tio estis terura, 40.000 mortintoj, en lando kun loĝantaro nur kelmiliona tio estas amasbuĉado, eĉ pli malbone ol post la pariza Komunumo.

Pliafoje dankon.

Roland Plateau, el Francio



La internacia vojo ESPERANTO

Naciaj aŭ internaciaj vojoj, tra la mondo, ekzistas multaj famaj vojoj :

- * la Vojo Sankta Jakobo de Kompostelo estas konata por pilmigradi,
- * la Vojo 66 por trairi la Usonon de oriento ĝis okcidento (3945 km) motorbicikle,
- * la Vojo Rikardo Leon´Koro (fama batalanto) por viziti kulturan kaj artistajn heredaĵojn,
- * la franca Nacia Vojo 7 pro sia beleco, la Vojo Via Domitia kiel unua vojo ligante la Alpoj kun la

Pireneoj.

Do, pro diversaj kialoj, kelkaj vojoj estas tre konataj.

Mia ideo estas krei la internacian vojon; **ESPERANTO danke al ZEOj**. Sed ĉu vi konas «ZEOjn»? «ZEOj» ekzistas delonge sed, laŭ mi, ili ne estas sufiĉe konataj, bedaŭrinde.

Do, mi deziras inviti vin pripensi tion kune : kiel valorigi « ZEOjn ? » por krei la

projekto de Isabelle Nicolas, el Francio

internacian vojon ESPERANTO.

Eble ni povus publikigi libretojn kun ĉiuj « ZEOj » de la Mondo kaj fari pasporton, kiu estus subskribita de la turismaj oficejoj aŭ la urbodomoj ?

Tiel la vojaĝantoj havus belegajn memoraĵojn de siaj vojaĝoj kaj Esperanto estu pli konata en la institucioj.

Ĉu vi havas aliajn ideojn? Bonvolu skribi al la ĵurnalo aŭ al: isabelle.nicolas2@gmail.com



Zamenhof/Esperanto-objektoj, ofte mallongige ZEO, estas diversaj objektoj nomataj honore de L. L. Zamenhof aŭ Esperanto. Ĉi tiu mallongigo estis unue uzata en la libro de Hugo Röllinger Monumente pri Esperanto - ilustrita dokumentaro pri 1044 Zamenhof/Esperanto Objektoj en 54 landoj.[1] La ZEO-j povas esti stratoj, placoj, monumentoj, ktp.

projekto de **Isabelle Nicolas**, el Francio



Dr. Ludwig Zamenhof
aŭtoro de la
internacia lingvo
ESPERANTO

Inteligentaj Birdoj

verkis Paŭlo Sergio Viana, el Brazilio



L La konata revuo Science publikigis studaĵon pri la inteligenteco de korvoj. Lastatempaj esploroj montras, ke ili havas cerban kapablon ekvivalentan al tiu de simioj, nome ĉimpanzoj kaj orangutanoj.

Impresa estas la konduto de korvoj, kiam temas pri problemoj solvendaj por ricevo de premioj. Oni montris, ke ili povas rezigni pri tuja rekompenco, favore al pli bona rekompenco en posta momento. Tio signifas, ke ili kapablas plani, antaŭvidi okazaĵojn, cele al pli alta valoro. Tion la sciencistoj taksas kiel inteligentecan similan al tiu de kvarjara infano.

Ekzemple, oni instruis al korvoj kiel malfermi skatolon, por havigi premion. Ĉi tion ili facile lernas. Tamen, kiam oni proponis al ili alternativan instrumenton, per kiu ili povus malfermi skatolon post certa tempo kaj ricevi pli valoran rekompencan, ili nepre elektis ĉi tiun lastan eblecon. Kiam oni submetis kvarjarajn infanojn al simila situacio, nur duono de ili elektis la prokrastitan premion. Korvoj tion decidis jam ekde la unua provo – do ne temas pri akirita kutimo.

Ankaŭ la memorkapablo de korvo estas fortega. Dum unu tuta monato ĝi kapablas rememori la vizaĝon de homo, kiu trompis ĝin.

Sciencistoj supozas, ke antaŭ milionoj da jaroj ekzistis ia prabesto kun komunaj trajtoj de simioj kaj korvoj – jen la klarigo pri ilia inteligenteco. Fakte, cerboj de iuj birdoj havas relative grandan kvanton da neŭronoj, kompare kun tiuj de mamuloj. Ankaŭ papagoj estas tiel bone provizitaj per cerba kapablo.

Dum la lastaj jaroj, diversaj studoj montris, ke

pluraj birdoj estas tre inteligentaj kaj povas uzi “ilojn” por siaj celoj. Egipta vulturo, ekzemple, ĵetas ŝtonojn sur ovojn por rompi iliajn ŝelojn. Mevoj uzas allogaĵojn por kapti fiŝojn. Oni vidis kanadan grupon, kiu uzis tolaĵon por sin sekigi! Ekzistas pego, kiu uzas ujon por transporti kaj manĝi mielon. Kaj afrika aglo, kiu ĵetas objektojn por ataki alian individuon. Tre kurioza estas la konduto de eta aŭstralia birdo, kiu ornamas la “plankon” de sia nesto per koloraj konkaj, ŝtonetoj kaj semoj, por allogi femalon. Ĉi tiu lasta birdo konstruas ellaboritan arkitekturaĵon por fari la neston pli agrabla.

Siavice, korvoj havas strategion por rompi nuksojn. En Japanujo, oni vidis, ke ili staras sur altaj dratoj, super trafikplena strato, kaj de tie ili ĵetas la nukson sur la asfalon, tiel ke ĝi rompiĝas sub radoj de aŭtomobiloj. Poste, la birdoj pacience atendas la verdan semaforon por piedirantoj kaj malsuprenflugas por preni la grajnerojn. En Nov-Kaledonio, korvoj fabrikas per folioj specojn de hokoj por kapti larvojn.

Observado de la naturo estas instrua kaj fascina. Estas interese konstati, ke inteligenteco kaj kreemo ne estas apartaj trajtoj de homoj.

Ĉi tiu artikolo ankaŭ aŭskultebles per ĝia fonto: <http://esperantaretradio.blogspot.com/2018/05/inteligentaj-birdoj.html>

verkis Paulo Sergio Viana, el Brazilio

Esperanto

verkis Apáti Kovács Béla, el Hungario



P or mi Esperanto estas tre grava. Ĝi estas mia dua lingvo. Sed neniu pensu, ke al mi ne plaĉas aliaj lingvoj. Mi volonte lernas ankaŭ aliajn. Verdire senĝene kaj neŭtrale mi povas babiladi nur per la Zamenhofa lingvo. Per ĝia helpo mi trovis multe da sinceraj geamikoj tra la tuta mondo.

Mi komencis lerni Esperanton ankoraŭ infanaĝe.



Eble tiam mi estis dekdu jara. Kelkfoje mi ĉesis la lernadon pro diversaj kaŭzoj. En 1972 mi fariĝis vera esperantisto. Ekde tiu ĉi jaro mi notas mian duan naskiĝon.

Laŭ mi estas bona sento esti esperantisto. Komence iomete ĝi estis stranga. Kvazaŭ mi estus transiranta en alian mondon. Antaŭ mi malfermiĝis giganta pordego kaj mi povis trapaŝi ĝian sojlon.

Mi vojaĝadis de Esperanto-kongresoj al Esperanto-renkontiĝoj. Dume mi trovis novajn geamikojn.

Mi tre ŝatis korespondi. Tiutempe mi korespondis kun pli ol 50 – 60 geesperantistoj el la tuta mondo.

Tiam ankoraŭ ne ekzistis interreto kaj la leteroj venadis per helikopoŝto kaj preskaŭ en ĉiu letero estis fotoj, bildkartoj pri ekzotikaj urboj, pejzaĝoj, kiuj vekis mian interesiĝon kaj ili instigis min ekvidi tiujn lokojn ankaŭ propraokule.

Do, Esperanto estas bonega afero. Bedaŭrinde ankoraŭ la homaro ne malkaŝis ĝian belecon. Anstataŭ ĝi oni lernas malfacilajn naciajn lingvojn

pensante, ke per ilia lernado solviĝos la Babela lingvoĥaoso.

verkis **Apáti Kovács Béla**, el Hungario

Kiel junigi la Movadon

-- artikolo el Libera Folio

Robert Nielsen en Irlando ekmiris, kie troviĝas ĉiuj novaj esperantistoj, kiuj ja devus aperi pro la novaj retaj kursoj kaj aplikajoj. Ili ja neniam aperas en la tradiciaj kunvenoj. Do li ekserĉis en sia ĉirkaŭaĵo.



La estonteco de nia movado estas la junuloj, tio estas kliŝa sed ja veras. Sen la nova enfluo de junaj esperantistoj, la komunumo malaperos kaj la lingvo mortos. Malkiel aliaj lingvoj, ni ne naskas novajn parolantojn (99 procentoj el la parolantoj ne estas denaskuloj) aŭ povas lernigi studentojn per lernejoj. Anstataŭe, ni devas allogi novajn homojn. Sen junuloj

Esperanto ne vivos.

Sed preskaŭ ĉiuj scias ke la movado havas junularan problemon. Lokaj kluboj estas ofte priskribataj kiel "maljunaj kaj malgrandaj", kaj ĉe la Universalaj Kongresoj oni vidas grandan ondon de grizaj kaj blankaj hararoj. Fakte, oni private informis min kia estas la averaĝa aĝo ĉe UK, kaj mi estis tre ŝokita. Mi ne scias ĉu mi rajtas diri ĝin publike, sed ĝi estas tre maljuna kaj post la aĝo de emeritiĝo. Kiam ili mortos, kiu anstataŭos ilin?

Granda problemo estas ke la tradicia movado ne allogas novulojn. La tradiciaj kluboj ne ŝanĝiĝis kun la mondo kaj nun estas tre eksmodaj kaj malnovstilaj. Kompreneble, ĉiu klubo kaj ĉiu lando estas malsama, sed estas komunaj problemoj en multaj landoj. La retejoj estas malnovaj, malbelaj kaj ne ĝisdatigataj. Ili apenaŭ uzas sociajn retejojn kaj ne proponas helpan manon al perditaj novuloj. Ofte la bultenoj estas disdonataj nur papere.

La kunvenoj ne havas inspiron, ĉiam faras la samajn aferojn. Oni ĉiam renkontiĝas en la sama loko, anstataŭ fari novajn aferojn kiel ludoj aŭ ekskursoj al urbaj vizitindejoj. Se novulo venas, tiu ofte sentas sin ekster la rondo. Eĉ bazaj aferoj estas forgesataj, ekzemple kiel enkonduki la personon kaj sentigi al tiu bonvenigon. Afero tiel simpla kiel preni ties detalojn por reinviti al la venonta kunveno, ne estas farata.

Entute, mankas al la kluboj energio kaj inspiro. Tio ĉi estas problemo ne nur en Esperantujo, tra la tuta socio malkreskas tradiciaj kluboj, ekzemple rondoj de ŝakludantoj havas grandan problemon, ĉar la membraro estas plejparte maljunaj viroj. En la dudek-unua jarcento, oni malpli emas iri al vizaĝ-al-vizaĝaj kluboj. Do jen problemo, kie la solvo?

Dum longe, Duolingo estis la nova espero por la movado, la gufo kiu alportos la novan sunleviĝon. Se la plej populara lingvolerniga retejo en la mondo instruas Esperanton, tio allogas grandan ondon da novaj uzantoj de la lingvo. Formale, la kursoj estas grandega sukceso. 1,3 milionoj da homoj uzas la kurson el la angla, preskaŭ 400 000 lernas el la hispana, kaj kurso por parolantoj de la portugala estis ĵus lanĉita.

Sed la Duolingo-kursoj havis preskaŭ neniun efikon sur la movadon. Se nur unu procento el la lernantoj aliĝus al UEA kaj TEJO, tio triobligus la membraron. Sed anstataŭ granda kresko, la membraro de UEA daŭre falis, kaj verŝajne ankaŭ tiu de TEJO (la membrokvanto de TEJO ne estas publika). Rigardante la kvanton de partoprenantoj ĉe renkontiĝoj kiel UK kaj IJK, oni ne vidas iun ajn kreskon post la lanĉo de Duolingo.

Kial la novaj lernantoj ne aliĝis? Duolingo estas populara ĉar ĝi estas ludo, sed eble ĝi tro similas al ludo. Iuj uzas la retejon ne por lerni, sed por ludi kaj amuziĝi. Ili komencas lingvon nur pro scivolemo kaj perdas intereson post kelkaj tagoj (aŭ eĉ kelkaj minutoj). La nombro de kurskomencintoj ne estas vere informa, nur la nombro de kursfinintoj estus vere tia – sed bedaŭrinde tiu nombro ne estas publika.

Certe ekzistas lago da novaj komencantoj, el kiuj la asocio povus ĉerpi, se ili havus la ĝustan ilon. Per kiu ilo fari tion? Honeste, mi ne scias, sed mi ja scias ke multaj asocioj eĉ ne faras provon. Duolingo mem provas helpi konekti novajn lernantojn al la komunumoj per la tiel nomata Duolingo-eventoj. Ĉi tiuj povus esti utilaj, sed ĝis nun mi ne provis ilin, ĉar oni devas kandidatiĝi kaj esti akceptita por rajti krei eventon. Mi kandidatiĝis por esti gastiganto en mia urbo, do mi vidos ĉu tiu ĉi estos utila allogilo.

Sed ĉi tiu ne estas lamento ĉe la funebro de nia movado. Mi verkas por vekoj, ne por plorigi vin. Mi ne iros trankvile nokten, mi batalos por krei lumon. Mi ne



scias la solvon, kaj petas vian konsilon, sed mi havas kelkajn ideojn. Unu granda afero, kiu helpegas nin, estas Amikumu. Multaj projektoj promesas multe, sed jen apo kiu vere estas revolucio. Junuloj uzas la interreton tiom multe ke por trovi kaj allogi novulojn ties utiligo estas nepra. Senpaga kaj belaspekta apo estas vere tre utila.

Esperantistoj ofte estas izolitaj kaj ne konas aliajn parolantojn de la lingvo. Kiam mi uzas sociajn retejon, mi babilas kun homoj el tre malproksimaj landoj, kio estas bona, sed ne helpas krei klubon. Sed per Amikumu mi povas vidi la proksimulojn, kaj la disaj proksimuloj povas kuniĝi.

Fakte tio eĉ inspiris min krei klubon por junuloj en mia urbo. Mi vidis ke estas multaj homoj proksime, kiuj ne apartenas al la tradicia klubo, do mi invitis ilin. Anstataŭ atendi ke ili kontaktu min aŭ iu alia solvu la problemon por mi, mi ekagis. Mi preteriris la tradician klubon kaj rekte kontaktis homojn per Amikumu.

Surprize rapide mi trovis dek esperantistojn kiuj volis renkontiĝi kaj aliĝi al junulara klubo, kaj nia unua renkontiĝo okazos la venontan semajnon. Eble ni iĝos la unua landa sekcio de TEJO en Irlando, ĉar ĝis nun

tio neniam ekzistis. Ĉi tio instruis al mi ke kvankam la movado en mia lando aspektis kiel dezerto, fakte subtere troviĝas fonto kiu povas nutri kreskantajn novajn ŝosojn.

Mi povus verki artikolon pri tio kiel maljunas kaj malkreskas la movado, sed mi preferas verki pri manieroj allogi novajn homojn kaj kreskigi la junularon.

Do, mi ne scias entute kiel junigi la movadon, sed mi certas ke oni devos forte labori. Ne sufiĉas nur atendi ke la novuloj venu al vi, vi devos serĉi kaj venigi ilin. Oni devos eksperimenti kaj ekprovi novajn ideojn. La interreto estos la malŝlosilo al nova generacio de esperantistoj, sed oni devos kapti la oportunon. Ne sufiĉos kaŝi sin antaŭ la moderneco kaj daŭrigi la tradiciajn metodojn, la moderna mondo estas trajno, oni devas kuri por ne postresti kaj por ĝin kapti.

Fonto: Libera Folio

<http://www.liberafolio.org/2018/05/28/kiel-junigi-la-movadon/>

artikolo por Libera Folio de **Robert Nielsen**, el Irlando

Pri "Vesperto - Literaturaj Folioj"

-- el Vesperto #312 majo 2018 (26-a jarkolekto)

Antaŭ dudekses jaroj naskiĝis la ideo krei esperantolingvan monatan revuon.

Komence ĝi ekaperis presite sur papero kaj ĝi estis dissendita al la abonantoj.

Vesperto ĉiam estis senpaga. Mi petis la abonanton nur pagi la sendokoston, kiu tiutempe estis sufiĉe alta en Hungario.

Ne nur la redaktado estis malfacila laboro, sed ankaŭ la sendado per helikopoŝto.

Poste la ekapero de interreto mi pensis, ke mi faros interretan revuon.

Mi decidis bone, ĉar tiel mia esperantolingva eldonaĵo povis atingi pli multe da geesperantistoj en la tuta mondo.

Kelkajn vortojn pri la enhavo. Vesperto estas literatura revuo. Sur la folioj mi donas eblon publikigi la verkaĵojn de komencantaj geesperantistoj. Krome ankaŭ amatoraj verkistoj kaj poetoj povas aperigi siajn verkaĵojn ĉi tie.

Por mi ĉi revuo estas tre grava, kaj espereble ankoraŭ longe mi povos aperigi ĝin.

Kompreneble estas necese ankaŭ via helpo. Ankaŭ en la estonto helpu, apogu min. Ĉefe legu

Vesperton!

Se vi legas mian eldonaĵon, tiam bonvolu reagi! Diru, skribu vian sinceran kritikon pri ĝi. Informu min, se sur la paĝoj vi trovis lingvajn aŭ aliajn erarojn.

Mia plano estas krei interesan, enhavoriĉan, esperantolingvan revuon por riĉigi la esperantan literaturon.

Sen via helpo Vesperto ne povas prosperi.

Ankaŭ en la estonto sendu al mi viajn mallongajn verkaĵojn, poemojn, informojn! Ni redaktu kune ĝin.

Mi ne povas akcepti longajn verkaĵojn pro lokomanko. Espereble vi komprenas min, kaj verkos mallonge.

Vesperto restos senpaga kaj ankaŭ en la estonto ĝi estos legebla interrete.

Laŭ mi vole nevole la gazetoj, revuoj kaj aliaj eldonaĵoj ekaperos en la sekvaj jaroj, jardekoj tiel. De tempo al tempo malaperos la paperogazetoj.

La mondo progresas kaj ĝin oni ne povas haltigi.

Ĉu tio estas bona aŭ malbona, ne eblas scii.

Sed ni ne ploru pro tio! Ni uzu la modernan teknikon por disvastigi Esperanton!

— Redaktanto (**Béla Apáti Kovács**) —

Por aboni peti ĉe : apatikb111@gmail.com

Fonto : **Vesperto #312 majo 2018 (26-a jarkolekto)**



Se oni petus de mi elekti el inter ĉiuj objektoj, kiuj faras la homan vivon bela, la precipan, senhezite mi montras la poezion kaj la muzikon. Mi kredas, ke la ĉiosciaj dioj, verŝajne en momento de eksterlima entuziasmo, eble de ia mistera ekstaziĝo, ekdeziris montri sian absolutan favoron al la homa gento kaj ili donacis al ĝi tiujn ĉi unikajn valoraĵojn. Irante ankoraŭ pli foren, mi esprimas mian kredon, ke tiuj ĉi provizoj estis kaj ĉiam estas same necesaj kiel la aero, la akvo kaj la nutraĵo. Cetere, mi bone scias, ke en Helenujo la unuaj homoj samtempe lernis serĉi pri la akvo, kultivi la teron kaj krei poemojn kaj muzikaĵojn. Tio okazis, ĉar ekde la komenco de la helena mondo estis dioj pri ĉio, pri la agrikulturo, la negoco, la saĝeco, la amo, la geedzeco k.a. kaj estis ankaŭ dioj protektantoj de la poezio kaj muziko. Krome, estis la Muzoj (Μούσαι), la naŭ diinoj flegantaj la sciencojn kaj artojn.



Ĉio tio ĉi tamen, ne signifas ke la poezio kaj la muziko estas aferoj helenaj; ĉie en la mondo aperis, daŭre aperas kaj ĉiam aperos mirigaj artistoj kiuj kreas poezion

kaj muzikon belegan. Neniu havas monopolon en tiu ĉi kampo, mi nur povas senhezite certigi, ke la unua, la superega poeto, muzikisto, kantisto, k.c., la korifeo en la tuta mondo kaj ĉiuj epokoj, aperis kaj ĉiam restas en Helenujo. Kompreneble mi parolas pri Orfeo!

Pri la naskiĝo de Orfeo estis diversaj opinioj. Laŭ la pli multaj mitoj li estis filo de Eagro (Οίαγρος), reĝo en Trakujo (Θράκη), kie Orfeo naskiĝis. Tamen, tio al multaj rakontantoj ne sufiĉis, ili kredis kaj diradis, ke Orfeo estis filo de Apolono (Απόλλων) mem, la dio de la lumo kaj la artoj. Ankaŭ pri lia patrino estis malkonsento. En la pli multaj helenaj regionoj oni kredis ke patrino de Orfeo estis Melpomena (Μελπομένη), la muzo de la muziko, sed en aliaj lokoj oni diris ke li estis filo de Kaliopa (Καλλιόπη), la muzo de la poezio kaj eposo. La homoj deziris prezenti lin didevena, superhoma, ĉar alimaniere oni ne povis kompreni kaj eksplicki, kiel ordinara, mortema homo havis tian raran talenton kaj tiom da kapabloj.

Li estis muzikkomponisto, gitar- kaj lirludisto,

kantisto, poeto, deklamisto kaj en ĉio tio ĉi li estis unike brila, nesuperebla, vere dia. Kiam Orfeo ludis la liron kaj kantis, estis ne nur la homoj kiuj kolektiĝis ĉirkaŭ li, ankaŭ la bestoj, sovaĝaj kaj malsovaĝaj restis senmovaj, la birdoj ĉesigis sian kantadon kaj svarme kolektiĝis kaj flugadis super li, ĝuante liajn melodiojn, lian superban voĉon. Eĉ la fiŝoj elsaltis el la maro por lin aŭdi, la fluado de la riveroj, la leviĝo de la ondoj, la blovo de la ventoj, ĉio ĉesis, eĉ la foliaroj de la arboj sin turnis al la direkto de lia kantado. Tia muzikisto estis Orfeo!



Li kantis ludante la gitaron, sed pli ofte sian liron, kiu havis ne la kutimajn sep, sed naŭ kordojn. La homoj diradis, ke li aldonis du kordojn, ĉar naŭ estis la muzoj, kiuj, kune, protektis ĉiujn artojn kaj sciencojn.

Orfeo ne estis militisto, li ne sciis la uzon de la armiloj, tamen li partoprenis la unuan grandan tuthelenan militiradon de la pli grandaj helenaj herooj, la alnomitaj Argonaŭtoj (Αργοναῦται), kiuj, sub la komando de Jazono (Ιάσων) konkeris la Oran Felon (Χρυσόμαλλον Δέρας) en la malproksima Kolĉido (Κολχίς). Orfeo, pli ĝuste la muziko de Orfeo, ludis gravan rolon en la sukceso de la ekspedicio. Per sia liro li donadis al la remistoj la ritmon laŭan al komplikaj cirkonstancoj, per sia kantado li ĉesigadis la disputojn kaj konfliktojn de la krudaj, varmtemperamentaj militistoj. Krome, estis la muziko de Orfeo kiu kvietigis la ondleviĝon, kiu logis la Simplegadojn (Συμπληγάδες), kiu endormigis la drakon – gardiston de la Ora Felo, kiu venkis la kantadon de la Sirenoj (Σειρήναι). Estas, do, vere ke la sukceso de la granda ekspedicio estis ŝuldata ne nur al la kuraĝo kaj forto de la heroaj batalantoj, sed ankaŭ al la dia muziko de Orfeo.

Ludante la liron kaj la gitaron, kantante kaj deklamante, Orfeo vagadis, unue en Trakujo kaj pli poste en la tuta helenlando, kaj ĉie homoj kolektiĝis ĉirkaŭ li, multaj sekvadis lin kaj tiele, iom-post-iome li akiris siajn adeptojn. Ĉar li parolis pri siaj ideoj, konvinkoj kaj principoj, eble senintence, li iĝis majstro de la pli fidelaj siaj aŭskultantoj, alivorte li iĝis fondinto de sekreta frataro praktikanta ian misteran kulton.

Liaj sekvantoj, la Orfeistoj (Ορφικοί), menciadis iun Dionizon Zagreon (Διώνυσος Ζαγρέας), iaman novnaskitan filon de Zeŭso (Ζεὺς) kaj Persefona (Περσεφόνη). Ili diradis ke la Titanoj (Τιτάνες), la praaj krimcaj diaj estaĵoj, venkita de Zeŭso, deziris venĝi al li, do, ili forŝtelis la bebon kaj ĝin voris. Zeŭso, per siaj fulmoj forbruligis ĉiujn Titanojn, el kies cindro, laŭ la

Orfeistoj, estis faritaj la homoj. Tiel, la adeptoj de Orfeo kredis, ke la homoj havas en si la dian elementon, tiun de Zagreo, sed ankaŭ la brutalan naturon de la Titanoj. Do, per sia virta vivado, per vegetara dieto, fastadoj, oftaj religiaj puriĝoj la Orfeistoj celis plifortigi en si la dian elementon kaj malfortigi la kriman econ. Oni diradis ke tiu estis la doktrino de Orfeo, tute kontraŭa al tiu de Dionizo, malgraŭ tio, ke ambaŭ misteroj havis komunan kultocentron, la urbon Eleŭziso (Ελευσίς), proksime al Ateno (Αθήναι).

Tamen, ĉio tio ĉi estas neklara, sekreta, mistera, ne komprenebla, estas afero de inicitoj; por ni, Orfeo estas precipe la nekomporebla, la unika muzikisto.

Tia artisto havis, kompreneble, koron akresentan, tiel, kiam li estis trafita de la sagoj de Eroso (Έρως), kun eksterordinara pasio kaj sindonemo li enamiĝis al Eŭridica (Ευρυδίκη), la belega driado (δρυάς), unu el la nimfoj de la arbaroj, kiun li hazarde renkontis. Li tuj edziĝis kun ŝi kaj ekde tiam li spertis la plenan feliĉon, elsuĉante avide la sukron de la plej valoraj vivdonacoj, la amo kaj la arto. Tamen, la feliĉo de Orfeo ne daŭris longe. Iun tagon, venena serpento mordis la piedon de Eŭridica kaj la bela virino tuje mortis!

La bato estis subita, fulma, insida, tute definitiva, tiel, ke la delikata koro de la kantisto preskaŭ frakasiĝis. En nur unu momento li perdis ĉion kaj tute vane li ludadis la liron super sia mortinta edzino. La funebro estis ne nur lia, ĝi estis ĝenerala; ĉiuj homoj, ĉiuj vivantaj estaĵoj, la tuta naturo partoprenis la akran doloron de Orfeo.

La malfeliĉa muzikisto povis fari nenion, li posedis unu nur armilon, sian muzikon, do post la unuaj mallumaj tagoj, tuj kiam li povis iel pli klare pensi, li decidis fidi ekzakte tiun sian solan armilon. Li decidis entrepreni tion, kion ne-niu mortemulo povus eĉ pensi, malsupreniri en la subteran mondon, en Hadeson (Άδης), en la malluman reĝejon de la terura dio Plutono (Πλούτων). Fakte, ludante sian liron kaj kantante siajn plej belajn amkantojn li trapasis la tutan



landon kaj kiam li atingis la faŭkon de Tenaro (Τάρταρον), la lokon sur kiu neniu vivulo iam paŝis, lia muziko enfluis en la mondon de la mortintoj. Tiam, mirakle, ĉio ŝanĝiĝis. Cerbero (Κέρβερος), la trikapa hundego, la terura gardisto de Hadeso restis

senmova, ĉia movo, ĉia bruo, ĉiu suspiro, ĉiu veo ĉesiĝis kaj la ombroj de la mortintoj, tute libere, ĉirkaŭis Orfeon kaj kun larmoj enspiradis lian transmondan dolĉan muzikon. Eĉ la terura Plutono ne



povis kontraŭstari al la magio de tia muziko. Li trovis Eŭridican inter la novvenintaj mortintoj kaj liveris ŝin al Orfeo. Laŭ la ordono de la granda dio, Eŭridica tute silente sekvus Orfeon, kiu devus ne sin turni, ne rigardi sian edzinon, ĉar, apartenante al la mondo de la vivantoj, devis ne vidi la ombran formon de mortinto. Tiele ili devus eliri el la subtera mondo, ĝis kiam ilin prilumus la suno de la supra mondo.

La delikata koro de la nobla artisto batadis freneze, liaj piedoj iĝis pezaj, lia spirado malfacila; li, nun, estis konsumita, por stari, por plue marŝi, li bezonis tujan mildigon de la forta, neeltenebla kordoloro, moderigon de la daŭra ĉagreno, li nepre bezonis la konsolon de la amata rigardo, de la amata kareso, de la amata mieno. Do, Orfeo sin turnis!

Li sin turnis kaj tuj Eŭridica malaperis kaj Orfeo estis definitive perdinta sian tutan mondon.

Post tio li deprimiĝis, li vagadis sencele, li ne plu parolis, ne manĝis, ne kantis, ne ludis la liron, li evitis la homojn, li montris antipation, se ne malamom, precipe al la virinoj, li restis tute sola, li senĉese lamentadis kaj post nelonge li mortis. Kelkaj diris ke li mortigis sin, liaj disciploj, la Orfeistoj kredis ke ilia majstro estis martirece mortigita de delirintaj Bakĥaninoj (Βάκχες).

Ĉu Orfeo mortis kiel ordinara homo? Ĉu kiel heroo, kiel duondio, kiel majstro? Kiu scias? Fakte estas, ke la homoj honoradis lin en Helenujo, en Mal-grandazio, en Italujo, ĉie, per sanktoferoj kaj ceremonioj decaj al dio.

Mi estas certa, ke eĉ se li rajtis eniron en Elizeo (Ηλύσια Πεδία), li preferis Hadeson. Inter la eterna sereno de paradizo kaj Eŭridica, mi estas tute certa ke li elektis sian amatan edzinon. Mi ne scias ĉu Plutono permesis al Orfeo preni kun si en Hadeso sian liron, tamen la emblemo de la unika muzikisto iĝis konstelacio; ĝi restas porĉiame sur la ĉielo, verŝajne responda pri la konservado de la ĉiela harmonio!

“GEMOJ EL LA HELENA MITOLOGIA KAJ HISTORIA TREZORO”

verkis **Spiros Sarafian**, el Grekujo

Elian-J. Finbert, naskiĝinta en 1896 en Egipto, poste iris en Francujon kaj iĝis beletristo, verkis ĉiajn librojn, romanojn, memoroj pri spertoj de lia travivaĵriĉa vivo, kiel kamelisto en Saharo, paŝtisto en provencaj Alpoj, proverbaroj el multaj popoloj, ĉefe iĝis konata dum jaroj 1950-aj pro lia serio de libroj, radioelsendoj kaj revuartikoloj : « La plej belaj rakontoj pri bestoj ».

La unuan el tiuj libroj mi esperantigis, ĝi aperis ĉe la eldonoj de MAS : jen ĝi en la katalogo de UEA : <http://katalogo.uea.org/?inf=9437>

Unu alia el tiuj libroj estis «Plej belaj okazaĵoj pri birdoj», eldonita en 1957. Mi esperantigis kelkajn rakontojn el tiu libro. Jen ili, kelkaj estas malgajaj, eĉ kruelaj. Kelkaj montras, ke birdoj foje ja scias, kio estas malespero pro morto, kaj scipovas sin kondukti trafe dum ĉagreno, kia leciono por homoj...

KANARIO (rakonto n° 223 p. 317-318)



Ĉiuvespere, post kiam oni esti kovrinta ĝian kaĝon, kaj mallumiginta, tiu kanario komencis aŭdigi tian mildan kanton, kian oni neniam aŭdadis dum la tago. Post kelkaj minutoj ĝi ĉesis, ĉiufoje finpunktiinte sian finaĵon per flugilbruo aparta. Oni kaŝobservis ĝin, kaj ege surprizite vidis grizan muson kroĉita je l'kaĝo, la kapeton ŝovita inter la stangetoj, kaj kiu maĉetis grajnoj de l'trogo. Sed, eĉ pli mirigege afero, la kanario pasigis la bekon sur la silkeca kolo de l'ronĝuleto kaj ja karesadis ĝin.

La vesperaj voĉumadoj estis vokoj, signalo. Kaj oni malkovris, ke l'muso cele atingi la kaĝon pendanta ĉe l'fenestro, grimpadis je kurteno, kies ŝtofon ĝi estis traborita nivele de l'manĝujo.

Tiu malkovro kaŭzis la musan pereon. Ĝi estis kaptita la postan vesperon, post la kanto de ĝia amiko serino, kaj lasta grajno-manĝo, kolfrakasita de la kaptilo, kiun oni estis muntita por ĝi.

Detiam la birdo ne plu trilis dumtage, ne plu sinbanis, ne plu balancis sin sur sia malgranda balancilo, ne plu saltadis de bastoneto al alia. Li spertis grandan ĉagrenon. Ĉar li ne plu estis revidinta la grizan muson, kaj ne komprenis. Sed kiam vesperiĝis, kaj ke oni estis tirinta la ŝtofon sur ĝian kagon, ĝi tiam ekkantumadis. Ĝia kanto fariĝis amemilda, longiĝis laŭ senfinaj rulruloj petegantaj kaj tristaj. Ĝi estis vokanta al sia amiko, kaj finfine dormiĝis, konjekteble pensante al ĝi.



Ĉar neblas, ke tragedio de amomanko ne estus ekregita en ĝi. Koron kaj cerbon ĝi havis kaj ĝi estis amo tute. Sed ĝi estis la soleca birdo en sia kaĝo, kaj soleco estas damno el kiu oni elkatenu perkantante ; tamen tiu iĝis paradizon, kiam griza muso venis vespere vizite plenigi ĝin per sia ĉeesto.

Kelkajn tagojn pliposte, oni trovis la kanarion sternita funde de la kaĝo la flugilojn malfermaj kaj la kruojn rigidaj.

(rakonto n° 231 p. 324)

La virbirdo de ovkovanta kanariino emis pli je disaŭdigi siajn ruladojn kaj trilojn ol nutri ŝin. Ĉiufoje, kiam tio okazis, la birdino lasadis la neston kaj peladis lin cirkaŭ la kaĝo, batante lin per beko, kaj diversmaniere montradis, ke ŝi estis kolera ; Poste ŝi revenis al siaj ovoj, ne provinte preni iom ajn da manĝo. Tio fariĝis en ege montrama maniero, kun klarega deziro komprenigi al la virbirdo, ke lia konduto estis fia !

Tiam oni vidis lin, simile submetita kaj penta edzo, urĝe kaj klopode serĉi por ŝi bekplenojn da nutraĵo, kaj tion farinte li reekis sian « belkanton » per duobliĝinta ardo, sed tuj se li daŭrigis ĝin tro longe, la kanariino, ree « admonis » lin.

tradukis **Roland Platteau**, el Francio



Rakonto de Adil Olluri, el Albanujo

La patrino tenis forte mian manon, kiel neniam antaŭe kaj mi, kiu neniam volis ke ŝi kaptu min tie, ĉifoje eksentis varmon pro manpremo. Ŝia blanka mano kovris kaj igis nevideblaj miajn delikatajn fingrojn. Mi sentadis la tremetojn de vejnoj de ŝia maldekstra mano, alvenintaj el la profundo de tiu koro, kiu volis nenion alian, krom forigi sian infanon disde Prishtina ¹. Ĉi tiu enlarmiĝinta urbo rigardadis nin ĉiujn, unu po unu, dum ni forlasis ĝin, ne pro malamo aŭ ĉar ĝi ne plu volis teni nin en siaj brakoj. Ne, ne la unua, nek la dua estis la kialo. Sed ni, kvazaŭ intertraktiĝis ke ĝi ne plu vidu niajn suferadojn kaj ne plu travivu la timon kiu igis nin sentiĝi kvazaŭ febraj ĉi tiujn du lastajn semajnojn, kaj nek ni vidu ĝin mortante viva, nian karan urbon, kiu estis vidinta nin irante, ludante kaj kurante tra la ties stratoj, kiel kaŝeme ni rigardadis la geamantojn interkisiĝante ĉe stratangulo aŭ loĝejnirejo.

La urbo estis la sola atestanto de multaj kozoj okazintaj al mi kaj al miaj amikoj, kiuj apenaŭ vidiĝis aŭ kompreniĝis de iu alia homo.. Tial, la fakto de nia

ke la policistoj estis forbatintaj unu el la amikoj de la patro, profesoron Hilmi, ili, senprokraste sin pretigis, por ke la morgaŭon, tuj post la krepusko de nova tago, ni tuj foriru kiel ĉiuj niaj najbaroj.

La patrino, tiun aprilan nokton, elprenis de sub la lito du grandajn ruĝetajn valizojn, kiujn ŝi apenaŭ estis lokŝanginta dum longaj jaroj, kaj en ilin ŝi enmetis niajn vestojn, premante ilin kaj ŝovante ilin ju pli profunden, por ke ili entenu des pli da kozoj, kunprenendaj la morgaŭon. Unue, ŝi enmetis miajn vestojn, poste tiujn de la patro kaj laste la siajn. Dum ĉi tiu momenteto mi rimarkis ke ŝi unuafoje rompis la vicordon, kiu fariĝis natura en nia familio, ĉar kiomfoje ni entreprenis vojaĝon, la patrino unue enmetis la kozojn de la patro.

Dum ŝi faris tion, la patro alproksimiĝis al sia biblioteko, kiu neniom estis malgranda kaj komencis rigardadi siajn librojn, tuŝadis ilin kaj rapide trafolumis ilin, kvazaŭ li volus adiaŭi al ĉiuj ili laŭorde kaj pardonpeti ke, senvole, li devus forlasi ilin. Ŝajnis al mi ke, tiujn momentetojn, li interbabilis kaj dividis la zorgojn kun siaj libroj, kvazaŭ ili estus liaj plej proksimaj amikoj aŭ liaj plej fidelaj soldatoj, kiujn ĉi tiu, kiel ilia superulo, ĉar venis la nerenversebla historia



momento, perfidos ilin je plej senkompata maniero. Ni eliris el la loĝejo la fruan matenon de la morgaŭa tago, kiu estis

foriro igis min, dum kelkaj momentetoj, perdiĝi en rememoraĝoj kaj pensadi pri la faritaĝoj kaj revitaĝoj en ĉi tiu urbo, kvazaŭ ni neniam plu revenus ĉi tie.

La patrino tenis per sia maldekstra mano mian dekstran manon, dum per la dekstra mano tenis nigran teknon, plej grandan kaj plej larĝan el tiuj de ŝi posedataj, dum la ceterajn pli malgrandajn tekojn ŝi estis lasinta en nia loĝejo el tri ĉambroj, kie ŝi kaj la patro, la hieraŭan vesperon, je 10-05 decidis ke la morgaŭon ni forlasu definitive ĝin. Dum longaj kvar tagoj ili hezitadis foriri simile kiel la aliaj, sed aŭdinte

malferminta sian kurteneĝon per malpeza pluvo, kio sufiĉis ke nian foriran vojon igu pli malvarma. Irinte malsupren tra la ŝtuparo, en ĉiu etaĝo, la patrino kaj la patro ŝajnis min ke ili malrapidigis la paŝon, ju pli malsupren irante, des pli senbrujaj iĝis iliaj paŝoj. Eble ili ne volis maltrankviligi la najbarojn, kiuj ankoraŭ povus esti endorme, malgraŭ ke la patrino, la hieraŭan vesperon, diris ke neniu el ili plurestis tie. Eble ili supozis ĉu reveni en la loĝejon aŭ daŭrigi la startitan vojon. Eble ili timis ke la paŝobruo povus ĝeni la verdĉapulojn, kiuj poste povus puni nin pro manko de

bonkondukteco. La patro estis ŝarĝita per du grandaj valizoj, tiel kiel mi havis la konvinkon ke li malfacile ilin tenis, ĉar mi aŭdis liajn anhelojn. Tio okazis al li kiomfoje li ege laciĝis farante iun laboron. Tiujn momentetojn li ege silentis, kvankam mi tutan tempon rigardis al li kaj atendis iun vorton li eldiri. Almenaŭ li dirus kiam ekveturos la trajno kaj en kiu trajnoparto ni eksidos, ĉu meze, antaŭe aŭ malantaŭe. Intrigis min ege tiu ĉi pertrajna vojaĝo, ĉar tio estis ja la unua fojo por mi. Sed mi ne povis aldiri ilin ke mi ŝatas enrajniĝi, ĉar mi sentis tion kvazaŭ promenadon.

Ĉio ŝajnis trista, malvarma kaj senvoĉa, neniu kisis min survange, nek karesis mian hararon. Simple, neniu aspektis kiel en la pli fruaj niaj vojaĝoj. Estis tiu vojo embarasanta, timigis min ĉiu ties rando, ĉiu hundobojo kaj ĉiu policista krio en lia lingvo, kiun mi ofte aŭdis, sed neniutage tio kortremis min tiel kiel en tiuj horoj, kiam la vortoj de ĉi tiu lingvo igin min ektemi pro febro. La kriego de unu el ili senĉapela, ĉar ilin mi ne kutimis vidi sen ĝi, tre terurigis min, eĉ kovris mian frunton per ŝvito. La patrino, kvazaŭ eksentinta tion, karesis mian hararon kaj miajn vangojn kaj ŝajnis min ke ŝi volus diri "ne timu, li nur mallaŭdas tiel envane, nenion malbonon faros nin", sed eble, pro timo al ĉi tiu kalva grandkapulo, ŝi ne kuraĝis aldiri min voĉe. Strange, la patro apenaŭ rimarkis la ŝviton sur la mia frunto.

Li, kun plumbe pezaj valizoj, vidis ne maldekstren, nek dekstren, ĉar liaj okuloj sekvis unudirekten la vojon. Certe li volis ke ni atingu plej rapide la stacidomon kie estis la trajno, tiel multe parolata dum lastaj tagoj, kiu estis malplenigante la urbon. Ĉi tiu trajno ŝajnis al mi kvazaŭ bona fabela drako savanta la senkulpulojn de la senkompata monstro, alfrontanta sur la ties vojo, ŝtopanta la ties akvon kaj forglutanta iun ajn unue kaptita de ĝi.

La terura grandkapulo, kune kun siaj tri sveltaj amikoj, tenantaj iliajn aŭtomatikojn kun la pafiluboj supren, estis envicigantaj nin sur la maldekstra flanko de la vojo, tutsame kiel nia instruisto, kiam li enkondukis nin en la klasĉambron. Ili kondukis piedpiede ne nur nin, sed ankaŭ la ceterajn civitanojn, same survojiĝintaj. Ankaŭ ili estis ŝarĝitaj per valizoj, kun infanoj permane, kaj kelkaj el ili tenis perbrake ankaŭ maljunulojn kiuj malfacile iradis. Estis longa kaj regula vicordo, similanta al homrivero, de momenteto al momenteto pleniĝinta de stratetoj kaj enirejoj de la loĝejoj, kiuj ĉikaze similis al la ties branĉoj kaj torentoj. Mi havis la konvinkon ke ĉi tiu rivero neniam haltus pleniĝante, ĉar de sekundo al sekundo li fariĝis pli granda kaj pli larĝa. Neniu aŭdacis rompi la vicordon kaj dismeti la harmonion de tiu kolono, konstruita tiel mirinde, de tiuj kiuj nur mallaŭdis kaj alkriis nin, ĉar por tio la larĝskapula kalvulo severe punadis, kiel li faris al

knabo ĉirkaŭ dudek jara, disigita ne pli ol kvin metrojn por helpi al povra maljunulino kiu apenaŭ povis moviĝi. Li disbatis lin per pugnoj kaj per la automatika pafilŝtupo li frapis al la malfeliĉa povrulo, kiu estis devigita trairi tutan vojon tiel sangumita kaj brovoŝirita. Ankaŭ kiam li lasis lin libera, la nia timiganto ne ĉesis mallaŭdante kaj ofendante la junulon, foje albane kaj foje en sia lingvo. Tiu vidaĵo kiu indus eĉ por la plej timegigaj filmoj, enigis la teruron en mian animon kaj igis min sentiĝi kvazaŭ en mellota sonĝo, de kiu la homo eĉ ne kuraĝas vekigi.

Tian travivaĵon havis mi tiutempe, ĉar mi ne kuraĝis eĉ plori kaj malŝarĝiĝi iomete de kortremoj, kiuj fariĝis ĉiam pli oftaj. Mi timis ne nur por mi mem, ne nur ke li povus frapi min, sed ankaŭ por ambaŭ gepatroj. La patro eble povus alfronti lin, povus redoni iun pugnon al li, dum la patrino neniel.

Ni alvenis ĉe la dezirata stacidomo kaj tie ni vidis la trajnon, kiu atendis nin malfermporde. Tiutempe, ĝi ŝajnis min la sola objekto kiu amis nin, kaj ju pli apude ni proksimiĝis, des pli kara ĝi fariĝis. Mi malpeziĝis iom kiam ni alvenis tie, ĉar ne plu kondukis nin la pugnanta kalvulo kaj siaj tri amikoj, sed estis tri aliaj policistoj, kiuj deekstere impresis pli kvietaj.

Ĝis ni alproksimiĝis ne pli ol dek metrojn for de la adorita trajno, du policistoj haltigis la patron. Unu estis altstatura kaj portis okulvitrojn dum la alia estis mezstatura kaj aspektis pli maljuna, ĉar oni rimarkis ĉe li la grizajn lipharojn, kiuj igis nevidebla la supran ties lipon. Ili interparolis kelkajn minutojn kun mia patro, sed mi ne sciis kion ili diris, ĉar la patrino ne lasis min alproksimiĝi al la angulo de tiu vojo perŝtone pavimita. Post iome, li revenis kun pala vizaĝo kiel neniam antaŭe, kio estis traflaviginta la vizaĝon kaj aldiris nin ke ni devus ekiri tuj, dum li alvenis kun la sekvanta trajno. La vizaĝo de la patrino morniĝis, larmetoj elgulis sur ĝin, kio tre rare okazis, dum mi rememoras ke mi estas dirinta kial ankaŭ ni ne atendu la alian trajnon, por ke ni ekiru trioje kune. Li kisis pasie la patrino, kion li neniam estis farinta je mia ĉeesto, dum ŝi apenaŭ ĉesigis la ploradon. Dumtempe, li ĉirkaŭbrakis min, kisis min surfrunte kaj manpremis min karese, sed mia mano ne volis disiĝi disde la lia. Mi klare rememoras, kvazaŭ okazis hieraŭ tiu disiĝo de la manoj kaj niaj fingroj, kiuj tiel malrapide disiĝis unu de la alia. La trajno ekiris. Mi vidis de la fenestro kiel oni enigis mian patron en tiun aŭtilon blublankan, ĝis kiam la patrino forigis min disde la fenestro kaj proksimigis mian kapon al ŝia brusto. Ŝajnis ke ĉi tiu pasaĝirportanto moviĝis tre malrapide, la sola moviĝanta surtere sen pneŭmoj, sed per feraj radoj sur kelkaj rektaj reloj fiksitaj tiel forte al la tero.

Oni estis eniginta nin je centoj da personoj en la ties vagonoj, kie apenaŭ estis spaco por surmeti la piedon,

por ne diri ke eĉ moviĝi de unu angulo al la alia. Oni aŭdis en ĝi ploradojn, kriojn, mallaŭdojn kaj kadukon de maljunulo, kiu, kiel oni diris nin pli poste, suferis pro astmo. Li mortis en la trajno ne pli ol dek minutojn post la ekiro. Por li verŝis larmotorentojn du junaj knabinoj, kiuj povus esti liaj nepinoj. Estis la unua fojo ke mi kunvojaĝis apud mortinta homo kaj la unua fojo ke mi vidis iun, el kies maljuniĝinta korpo, eliĝi la animo. La patrino kovris miajn okulojn por ke mi ne vidu tiun senvivan estaĵon, ĝiskiam du personoj prenis lin kaj sendis mi ne scias kie. Ĝiskiam ĉi tiu trajno, tiel rustiĝinta kaj fariĝinta kadukaĵo, tiel deinterne, kiel deekstere, moviĝis tiel malrapide por venigi nin kviete en la mondon kiun ni ne konis, mi rigardis de momenteto al momenteto tra la fenestro, kun espero ekrimarki ie la spurojn de iu portanto simila al la nia, kun kiu estas alvenonta la patro. Mi lacigis la patrinon per senĉesaj demandoj: kiam ekiros la trajno de la patro, ĉu ankaŭ en ĝi estos tiom multe da homoj kiel ĉe la nia, ĉu mortos iu povra maljunulo ankaŭ en ĝi. La samajn demandojn mi faris la tutan vojaĝon, aparte la unuan, min interesis scii precize la ekiran horon kaj la denovan renkontiĝtempon kun la patro.

La trajno finfine haltis kaj tre malpezigita, mi cerbumadis ke la sama ĉi trajno, ĉi tiu portanto de la forpelitaj animoj, forigis nin disde nia mortoportanta lando, estas venigonta nin en landon, kie ni trovos angorokvietigon. Sed, la moviĝanta rustiĝinta ferulo estis veniginta nin en kotajĵita valo, ĉe kies flanko fluadis rivero pli malpura ol ĝi mem. Mi kaj la patrino, ŝovante niajn valizojn, kiujn ne pli ol du horojn antaŭe portadis la patro, malrapide eniris enen de ĝi, kiun la pluvo desupre en la ĉielo kaj la larmo malsupre de la homo estis malsekiginta tiel multe kiel ĝi estis transformita en lokon kie malvarmumiĝis, de la kapo ĝis la piedoj, ĉiu espero de la ĵus eltrajniĝintoj. Dum kvin tagoj de nia restado tie, la suno apenaŭ vidis nin al la okuloj eĉ unu tagon, ne ĉar ĝi ne amis nin, sed ĉar ĝi estis lasinte la ĉielon plori por ni, dum ni preskaŭ ĉiutage ploris por si mem. Ni transformis en larmejon tiun vilaĝan valon, kiu, ŝajnis min, portis en sia abdomeno, aŭ pli bone diri sub ties ungegoj, preskaŭ ĉiujn urbohomojn kaj eble ankaŭ la homojn de la ĉirkaŭaj urboj. Mi ne povus imagi ke oni povus enmeti ĉiujn dupiedajn enspirulojn de la mia granda urbo en tiom malgranda loko. Kelkaj junaj knaboj, grimptaj sur remorkoj de traktoroj kaj kamionoj, pri kiuj oni diris ke estis alportitaj de iuj bonfaraj asocioj, alĵetis nin panbulojn kvazaŭ al vagabondaj hundoj, dum ni, kiel malsataj birdoj, akceptis ilin per la levitaj manoj, interŝovante kaj interpuŝante unu la alian. La plej potencaj povus pli multe interkubutiĝi, tiel ili sukcesis ricevi plej varmajn kaj plej molajn panbulojn,

dum ni, malpli fortaj, estis kontentaj ricevi eĉ pli malvarmajn panbulojn. Mi memoras ke ambaŭ mi kaj la patrino ege malpuriĝis postkurante kamionon dissendanta plastajn kovrilojn, kiun pene ni certigis al ni, por ke ilin surmetu ie kaj konstrui rifuĝejon kontraŭ la subtilan pluvon senĉese enfalanta. En ĉi tiu aĉa loko, oni povus vidi nenion alian ol lacajn homojn spirite elĉerpitajn. Mia okulo vidis plorantajn infanojn, kurantajn virojn post la panbuloj kaj plastaj kovriloj, virinojn kaj junajn knabinojn brilperditaj kaj maljunulojn kiuj ĵuris ke tian militon ili apenaŭ estis vidintaj antaŭe, nek estis travivintaj iam ajn. Oni povus diri ĉion, krom la belaĵojn, kiuj povus igi vin sentiĝi bone tie, malgraŭ la fakto ke nun supre de niaj kapoj ne plu estis la pugnoj kaj la automatikoj de la kalvaj kaj longharaj policistoj, grandmustakaj kaj favulaj, obezaj kaj sveltaj, kaj multaj aliaj diversaj angoroportantoj, dirantaj la samajn vortojn al ni.

Malsame al la vojaĝo kun ĉi tiu malnova kaj malrapida trajno, kie unuafoje en mia vivo mi vidis mortantan homon, en ĉi tiu loko mi vidis unuafoje naskiĝantan estaĵon. Juna novedzino, troviĝanta ne pli ol dudek metrojn for de ni, naskis knabon. Ŝajnis min ke dum momenteto, en multaj vizaĝoj sentiĝis ĝojventeto, kiu tamen daŭris tre mallonge.

Ĝiskiam la kolono de la translokitoj tra la urbaj stratoj similis al senfina rivero, ĉi tiu valo similis al densa homa maro, kiu de momenteto al momenteto, pleniĝis. Dum tiuj tagoj de nia restado tie, ĉiun matenon kaj ĉiun minuton mi tenis la kapon turnita al tiu valo. Angore mi atendis la sekvantan trajnon per kiu alvenus la patro. Nur tien mi direktis mian menson. Ĝi kontinue aldiris min la samajn vortojn, ke li venus nepre, ke li ne povus veni per tia trajno rustiĝinta kia la nia, ke por profesoroj oni difinis iun novan, kie estus nur kvieto, libroj kaj klasika muziko, kiun mia patro aŭskultis plezure. Sed, tiu trajno ne estis venanta. Lun tagmezon la patrino kaptis min permane kaj aldiris min ke ni devus foriri en alian lokon. Mi neniel volis ekiri. Mi volis atendi la trajnon de la patro, sed ŝi altiris min tiel perforte kaj potence, kion ŝi neniam faris, kaj malgraŭ mian neĉesantan ploradon, enigis min en ĉielkoloran buson, atendanta nin sur la strato supre de ni. Mi ne sciis kien ĝi kondukos nin. Eble en alian valon.

¹ Ĉefurbo de Kosovo

tradukis **Bardhyl Selimi**, el Albanujo

DUA PARTO - LA VIVO



44

Kio estas pli grava al ni, la renomo aŭ la persona stato?
Kio estas pli valora,
la stato de persono aŭ ties posedo?
Kio estas pli malbona,
gajni aŭ perdi?

Sed nun tio:

Tiu, kiu dependigas sian koron de alia,
neeviteble foruzas grandan.

Tiu, kiu multe kolektas,
neeviteble perdas gravan.

Tiu, kiu estas kontenta,
ne fariĝas hontinda.

Tiu, kiu scias halti ĝustatempe,
ne endanĝerigas sin
kaj tiel povas ekzisti eterne.

Rimarkoj de Anniespera

Vilhelmo:

"Tiu, kiu dependigas sian koron de alia, neeviteble foruzas grandan."

La laŭvorta traduko estus tiel:

"Tro da amo necese foruzas grandan."

45

Granda perfektigo ŝajnas kvazaŭ nesufiĉa,
tiel ĝi fariĝas senlima dum sia efiko.
Granda pleno ŝajnas kvazaŭ torenta,
tiel ĝi fariĝas senelĉerpebla dum sia efiko.
Granda rekteco aspektas kvazaŭ kurbigita.
Granda talento ŝajnas kvazaŭ stulta.
Granda elokvento ŝajnas kvazaŭ muta.
Movado venkas la fridon.
Kvieto venkas la varmegon.
Pureco kaj kvieto estas la juĝmezurilo de l' mondo.

Rimarkoj de Cezar

Laŭ Anniespera la originala vorto "chong", tradukita de Vilhelmo per "torenta", havas pluajn sencojn, ekzemple "malplena" ks. Se oni tralegis la tutan tekston laŭ ŝi facile konstateblas, ke Laocio traktis sian ideon per kelkaj paroj da kontraŭvortoj. Tial, ankaŭ post komparo al la traduko de Wang Chongfang, la signifo de la originala vorto "chong" estas "malplena" kaj ne "torenta." "Granda talento" tradukas Wang Chongfang per "lerto". La vorto "muta" laŭ la originalo devus esti "balbutema". "Movado" de Vilhelmo en la originalo estas "rapida moviĝo".

(daŭrigota)

Facilaj rakontoj

Vojo al Eŭropo



Ĉu Esperanto prosperos en nova Eŭropo aŭ ĝi formortos kaj ĝi estos forgesita, kiel multaj lingvoj?

Estus bone kredi, ke Zamenhofa lingvo transvivos ĉiujn malfacilaĵojn kaj alvenos tempo, kiam ĝi iĝos la dua gepatra lingvo de la homaro.

Ĉu la homaro estas maturiĝanta por akcepti ĝin aŭ stulte batalos kontraŭ ĝi?

sendis Jindřiška Drahotová, el Ĉeĥio

Eble Esperanto estis eltrovita tro frue. Ankoraŭ sur la ter globo ne solviĝis multaj problemoj. Ekzemple ni homoj ne povas liberiĝi de la militoj. Ni kredas – la problemoj plej ofte estas solveblaj nur per armiloj. Ankoraŭ milionoj da homoj malsatmortas, kvankam Tero povus nutri la tutan loĝantaron, se la produktaĵoj kaj aliaj estus dividitaj juste.

Ni esperantistoj ofte estas akuzitaj, ke ni troigas lingvan problemon. Ja, la angla lingvo sukcese plenigas la rolon de monda lingvo. Ankaŭ en nova Eŭropo ĝi iĝos la helplingvo per kiu diverslingvaj homoj komunikos...

Sed ni ankoraŭ ne scias respondon. Fakte ni ekpaŝis la vojon al Eŭropo kaj iutage ni alvenos, sed neniu scias, kiel ni komprenos unu la alian.

Sed antaŭ ni, geesperantistoj, la pordo jam estas malfermita.

-- Rakonto de **Apati Bela Kovac** el Vesperto





La vojo al la
revoj senfina estas
pri ĉiu aĝo.

Sen vin atendi
tiktakas la horloĝo -
kosma regulo.

Kun roz' en la man'
la Printemp' ploras triste.
La sun' sin kaŝis.

Gaja somero
luladas la esperon.
Odoro de gren'.

Riĉa aŭtuno
kolorojn disĵetas.
Ĝojo dumvoje.

Knabin'en blanko
dancas inter la steloj.
Vintro - Vivaldi.

Koron mian mi
vin donacas kun amo.
Koro kun amo.

Sentimaj laroj
inter la mara ŝtormo.
Anima eĥo.

Dum la nebula
nokt'- konsolo en basen'.
Viv' en nebulo.

La anim'- floro
ne floras dum soleco.
Parolo kun Mi'

River' survoje,
kiel hom' en la vivo -
traboras vojon.

¹ Iglia Besson estas pentristino el
bulgario-svislando.

verkis kaj sendis **Elena Popova**, el
Bulgario



Patrina kares' -
kor' ĉe koro kun amo.
Spirita ligo.

Homo kaj arbo
sopiras al ĉielo.
Nur birdoj flugas.

Lotusa ŝipo
sur la rivero de l' viv'.
Rozkolora rev'.

La homa vivo -
vojo en sorĉbaro.
Serĉanta anim'.

La Aŭtunaj Muŝoj (parto 2)

Karaj geamikoj, karaj legantoj,
Kun plezuro, mi prezentas al vi mian novan
tradukaĵon. Temas pri novelo, eĉ mallonga
romano, de Irène NEMIROVSKY (1903-1942).

Image Irène naskiĝis en Ukraino
(tiam Rusia Imperio) en juda familio,
kiu parolis la francan. Kiam komencis
la Rusia Revolucio, ŝi migris kun sia
familio al Francio, kie ŝi iĝis fama
verkistino. Arestita de francaj
ĝendarmoj kaj deportita, ŝi estis
mortigita de la nazioj en Aŭŝvico
(Auschwitz).

Forgesita post la Dua Mondmilito, ŝi
estas la sola verkisto, kiu ricevis la
Premion Renaudot postmorte pro ŝia

longa romano "Suite française" (2004).

Ŝian novelon "La Balo" mi jam tradukis en
Esperanto.

(Ligiloj :

<https://www.ipernity.com/blog/mike59/685797>

Romano de Irène Némirovsky

kaj ankaŭ ĉi tie:

<https://novajhoj.weebly.com/libroj-en-esperanto.html>

aŭ ĉe Facebook: <https://www.facebook.com/groups/librejo/files>)

Mi deziras al vi agrablan legadon!


Koran dankon al IVAR kaj GINETTE pro la atenta
legado kaj iliaj amikaj rimarkoj !
Dankon al TJERI pro liaj klarigoj.

MIKELO (Michel Dereyger)

LA AŬTUNAJ MUŜOJ (1931)
(daŭrigata)

La apartamento de la infanoj estis konstruita en la
malnova parto de la domo.

Ĝi estis bela hejmo de nobla arĥitekturo kun granda
greka frontono ornamita per kolonoj ; ties parko
etendiĝis ĝis la proksima vilaĝo, Suĥarevo.



De kvindek unu jaroj Tatjana Ivanovna neniam forlasis ĝin. Ŝi konis ĉiujn ĝiajn murŝrankojn, ĝiajn kelojn, kaj la forlasitajn mallumajn ĉambrojn en la teretaĝo, iam uzitaj por la solenaj okazaĵoj, kie pasis pluraj generacioj...

Ŝi rapide trairis la salonon.

Cirilo ekvidis ŝin kaj ride vokis :

"Nu, Tatjana Ivanovna ? Forveturos viaj karuloj, ĉu ?..."

Ŝi kuntiris la brovojn kaj samtempe ridetis.

"Nu, iru do ! vin ne damaĝos iom vivi miskomforte, Ciriluŝka!"

Tiu ĉi kaj lia fratino Lulu havis la belecon, la brilantajn okulojn, la kruelan kaj feliĉan mienon de la antaŭaj Karin.

Lulu estis valsanta inter la brakoj de sia juna prakuzo Ĉerniĉev, dek kvin jaraĝa liceano. Ŝi mem ĵus aĝis dek ses jarojn en la antaŭtago. Ŝi estis ĉarma kun siaj vangoj ruĝaj pro la danco, siaj nigraj dikaj harplektaĵoj volvitaj cirkaŭ ŝia eta kapo, kvazaŭ malhela krono.

Tatjana Ivanovna meditis :

"La tempo ! La tempo ! Ha, Dio mia ! Ni ne rimarkas kiel rapide ĝi fuĝas kaj iun tagon ni ekvidas, ke la etaj infanoj fariĝis pli altaj ol ni... Ankaŭ Luliĉka estas nun granda knabino... Dio mia ! Kaj nur hieraŭ mi diris al ŝia patro :

"Ne ploru, Kolinka, ĉio pasas, koro mia !" Kaj nun li estas jam maljunulo..."

Tiu staris antaŭ ŝi kun Helena Vasiljevna.

Li vidis ŝin, tremetis kaj diris :

"Ĉu jam, Tatjanuŝka ? Ĉu alvenis la ĉevaloj ?"

"Jes, tempas foriri, Nikolao Aleksandroviĉ. Mi tuj petos, ke oni enmetu la valizojn en la glitveturilon."

Li mallevis la kapon kaj mordetis siajn longajn palajn lipojn.

"Ĉu jam, Dio mia ?! ... Nu... tiel estas !... Iru, iru... "

Li turnis sin al sia edzino kun pala rideto kaj diris per sia laca kaj kutime kvietita voĉo : "Children will grow, and old people will fret..." Ĉu ne, Nelly ? Nu, mia karulino, mi opinias ke jam estas tempo."

Ili silente rigardis unu la alian.

Ŝi nerve reĵetis sian skarpon el nigra punto sur sian longan kaj flekseblan kolon, la nura beleco daŭre

sendifekta de ŝia junaĝo, kun la verdaj okuloj trembrilantaj kiel akvo.

"Mi iras kun vi, Tatjana."

"Kial iri?... " demandis la maljuna virino levante la ŝultrojn. "Vi nur malvarmumos !"

"Ne gravas", ŝi senpacience flustris.

Tatjana Ivanovna silente sekvis ŝin.

Ili trairis la senhoman etan galerion.

Antaŭe, kiam Helena Vasiljevna nomiĝis grafino Eletzkaja, kiam dum la someraj noktoj ŝi venis kuniĝi kun Nikolao Karin en la pavilonon funde de l' parko, tra tiu pordeto ili eniris en la dormantan domon... matene ŝi kelkfoje renkontis la maljunan Tatjana tie... ŝi ankoraŭ vidis ŝin cedi lokon kaj sin krucosigni dum ŝi mem preterpasis.

Tio ŝajnis malnova kaj fora kiel stranga sonĝo.

Post la morto de Eletzki ŝi edziniĝis kun Karin...

En la komenco, la malamikeco de Tatjana Ivanovna incitis kaj ofte ĉagrenis ŝin ... Ŝi estis juna. Nun estis malsame.

Kelkfoje okazis, ke ŝi gvatis kun ia ironia kaj trista plezuro la rigardojn de la maljuna virino, ŝiajn pudorajn retromovojn, kvazaŭ ŝi ankoraŭ estus la pekanta adultulino kurante al rendezuo sub la maljunaj tilioj. Almenaŭ tion ŝi konservis de sia junaĝo.

Ŝi laŭvoĉe demandis :

"Ĉu vi nenion forgesis ?"

"Nenion, Helena Vasiljevna !"

"Forte neĝas ! Oni aldonu lankovrilojn en la glitveturilon."

"Vi povas trankviliĝi."

Ili puŝis la pordon al la teraso, kiu malfacile kaj grince malfermiĝis pro la dika neĝtavolo.

La glacia nokto estis plena de l' odoro de frostitaj abioj kaj malproksima fumo.

Tatjana Ivanovna ligis sian ŝalon sub la mentono kaj kuris al la glitveturilo.

Ŝi estis ankoraŭ rekta kaj vigla kiel en tiu tempo, kiam en la krepusko ŝi serĉis la infanojn Jurij kaj Cirilo en la parko.

* *"La infanoj kreskos, la maljunuloj zorgos."*

(daŭrigota)

tradukis MIKELO (Michel Dereyger), el Francio

Mallonga Historio de Filozofio (30)



Saluton,

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun la jena filozofo.

Vasil Kadifeli

Friedrich Nietzsche (1844-1900)

La Morto de Dio

"**D**io mortis" estas la plej fama diraĵo de la germana filozofo Nietzsche. Sed kiel Dio povas morti? Nemortemuloj neniam mortas. Tamen Nietzsche ne volis diri, ke Dio iam vivis sed nun estas morta. Li volis diri, ke oni forlasu sian kredon je Dio. Tiun diraĵojn fakte ekparolas fikcia karaktero en sia libro "**La ĝoja scienco**", kiu per torĉo enmane serĉas Dion sed ne povas trovi lin.

Nietzsche estis eksterordinara homo, li fariĝis profesoro en Bazela universitato kiam li estis 24 jaraĝa sed li estis ekscentra, originala kaj ne konformista homo. Li ĉiam provis malfaciligi sian vivon. En 1879 li malsaniĝis kaj forlasis la universitaton. Li vojaĝis al Svislando, Italujo kaj Francujo. Li verkis siajn famajn librojn, kiujn oni ne legis en sia tempo. Poste li suferis el mensa malsano kaj restis en mens-malsanulejo en siaj lastaj jaroj. Li ne prezentis siajn ideojn en ordigita maniero, li alproksimiĝis al siaj pensoj el diversaj direktoj, li plejfoje skribis mallongajn tekstojn eĉ kelkfoje nur frazojn. Ili iam estas ironiaj, iam sinceraj, iam arogantaj, iam provokaj. Li ŝajnas kelkfoje krei sed kelkfoje flustri al sia leganto. Lia stilo estas tia, ke li kun la leganto ŝajne estas en la sama flanko, komprenante unu la alian, kvankam ĉiuj aliaj, kiuj ne komprenas la ideon estas en la alia flanko. Sed li, en la fino, ĉiam tuŝas la temon pri la "estonteco de moralo".


Kio se Dio mortos? Lia respondo estis, ke tio forlasos nin sur senmorala bazo. Niaj pensoj pri la bono kaj malbono, pri la vero kaj malvero estas signifoplenaj nur kun la ekzisto de Dio. Se ni forigos Dion, vi ankaŭ forigos la principojn pri nia vivmaniero, nia taksado kaj valorigo pri la diversaj aferoj. Neniu en sia tempo ŝatus aŭdi tiajn dirojn. Li sin priskribas kiel homo "kontraŭ moralo", kiu ne intence kondukas malbone sed invitas la leganton preterpasi la "moralon". Kiel la titolo de sia libro ni devas esti "**Preter bono kaj malbono**". Tamen la morto de Dio malfermas novajn oportunojn, kiuj estas kaj timigaj, kaj ekscitaj. Religio pere de moralaj reguloj limigas la

vivon de homo, sed la neekzisto de Dio forigas tiujn limojn kaj ebligas ĉion. Tio ebligas al homoj, ke ili kreu siajn proprajn valorojn por si mem. Ili kreas sian propran vivmanieron kaj konvertos sian vivon al artaĵo. Homo tiam defias ĉion ajn en la vivo.

Por ni eble kompato kaj bonkoreco estas virtoj de alta valoro. Tamen se ni malkovros, kiel dum la historio ni atingis tiajn pensojn kaj sentojn, tiam estos malfacile akcepti, ke ili estas konstantaj por ĉiuj tempoj. En sia libro "**Pri la geneologio de moralo**" li priskribas la valorojn de la aristokratoj kaj fortuloj en la antikva Grekujo. Tiam homoj alte taksis la ecojn de honoro, honto kaj heroeco, kaj tiujn ecojn ni povas trovi ĉie en la antikvaj grekaj verkaĵoj. Sed poste la malfortuloj aŭ la sklavoj konvertis tiujn sentojn de fortuloj al malavareco por, kaj angoro pri la malfortuloj. Nietzsche taksis la virtojn de la fortuloj pri altaj ol la virtojn pri la malfortuloj kaj laŭ li, tiu transformiĝo okazis pere de la "envio" de malfortuloj. Laŭ Nietzsche Kristanismo kaj ties moralaj instruoj kondukis ŝajne, ke ĉiuj individuoj posedas la samajn valorojn, sed tio estis malvero ĉar Shakespeare kaj Bethoven estis pli elstaraj homoj ol la "grego". Por li la valoroj de Kristanismo, kiu evoluis pere de "envio" fakte malhelpas la homaron. Sed tiu estis tre defia pensmaniero.

En sia libro "**Tiele parolis Zaratuŝtra**", li parolas pri la superhomo (germane "Übermensch"), kiu estas estonteca homo ne permesanta al la tradiciaj moralaj reguloj malhelpi sin, kaj kiu preterpasante ilin kreas novajn valorojn. Influita de la natura evoluo de Charles Darwin, li pensas pri "Übermensch", kiel la posta paŝo en la homa evoluo. Tiu estas iomete danĝera pensmaniero ĉar li apogas tiujn, kiuj ŝajne estas "herooj" kontraŭ la intereso de aliaj, ĉar la "herooj" tiam faros kion ajn ili volas. La nazioj prenis tiun ideon el Nietzsche por apogi siajn pensmanieron, tamen la generala akcepto estas ke ili aliformigis la ideojn de Nietzsche.

Post lia morto, liaj verkoj restis en la posedo de lia fratino Elisabeth Förster-Nietzsche, kiu estis germana naciisto kaj malamiko de judoj. Ŝi uzis nur tiujn partojn de la ideoj de sia frato, kiuj apogis sian propran pensmanieron, kaj forlasis la aliajn partojn. Ŝi per "kopio kaj algluo" de parte kolektitaj ideoj de Nietzsche preparis libron titolita "**Volo de Potenco**" kaj tiu libro fariĝis propaganda materialo por nazioj.



(daŭrigota)

Ŝercoj



Du pentristoj
babiladas:
— Kiel opinias la
kritikistoj pri via
verkaĵoj.

— Unu bedaŭras la tolon, la alia la
fabon.

HUNDO KAJ LEOPARDO

Inteligenta hundo paŝadis en
dezerto, kiam improvize rimarkis, ke
leopardo kuregas rekte al ĝi. Ne
ekzistas duboj, ĝi volas manĝi min,
pensis la hundo. Rapide ĝi komencis
pripensi, pri la farenaĵo. Ĝi rimarkis ke ĝuste apude
kuŝas kelkaj ostoj. Ĝi rapide ekkomencis mordeti la
ostojn.

Kiam la leopardo estis jam proksimege, ĝi ekkriis:

— Ho kiel bongusta estis ĉi tiu leopardo! Kiel bone
estus se mi povus trovi proksime alian tian
bongustaĵon. Aŭdinte ĉi tion la leopardo tuj haltis, kaj
poste timoplene grimpis sur arbon.

Ĝi pensis:

— HUUU, kiel danĝera situacio. Ĉi tiu hundo jam
preskaŭ kaptis min...

Sed, sur proksima arbo estis simio kiu vidis la
okazintaĵojn kaj pensis ke ĝi povus akiri bonan
poenton ĉe la leopardo se ĝi rakontos kio envere



okazis. La leopardo, eble fariĝos malpli agresiva al ĝi.
La leopardo, aŭdinte la veron, kolere degrimpis el la
arbo kaj diris:

— Venu simio, sidiĝu sur mian dorson kaj vi vidos kio
okazos al hundo kiu trompis min!

La hundo rimarkis kio okazis kaj vidis la leopardon
proksimiĝantan kun la simio sur la dorso. Ĝi komencis
rapide pripensi pri la farenaĵoj. Fine ĝi sidiĝis
proksime al la ostoj, montrante la dorson al la
proksimiĝanta leopardo, kvazaŭ li ne estus vidinta ilin.
Kiam ĝi sentis ilin proksimaj, tuj ekparolis:

— Diable! Kie estas tiu simio? Simiojn oni ne povas
fidi. Jam pasis duonhoro de kiam mi forsendis ĝin por
trovi por mi alian leopardon...

La Pigra Kato (fabelo)

Kaj estis kaj ne estis. Trans la Fabeloceano vivis
pigra kato. Dum la tuta tago ĝi nur dormetis
apud la varma forno.

Ĝi ne deziris ĉasadi la musojn, kvankam ili tre
multoblis en la domo de la maljunulino.

Komence la maljunulino provis konvinki sian katon,
ke ĝi kaptu aŭ forpelu la musojn. Sed kiam ŝi vidis, ke
la kato prefere kuŝas apud la forno ol kaptadi la
musojn, ŝi tre koleriĝis.

— Aŭskultu min, kato mia! — ŝi diris al la pigra besto
— En la domo estas multe da musoj. Ili manĝas ĉion
en la nutraĵkamaro. Mi ordonas al vi tuj kapti la
musojn! Se ĝis la morgaŭa mateno, eĉ unu muso
cincados tie ĉi, mi forpelos vin de la domo.

La kato vole nevole devis kaptadi la musojn. En la
nutraĵkamaro ĝi baldaŭ enuiĝis. Krome tie ĉi estis
malvarme. Mankis al ĝi la komforta kuseneto sur kiu ĝi
kutimis dormeti.

La nokto ĝis mateno estas tre longa — pensis la
kato.

Ĝi cerbumis, kion fari, ke ĝi ne devu kaptadi la
musojn? Nenio bonega ideo venis en ĝian kapon. La

verkis Apáti Kovács Béla, el Hungario

kato malgaje sidis en la malhela
angulo de la kamero.

Subite malgranda muso ekaperis
antaŭ ĝi kaj ridante ĝi demandis:

— Kial vi malĝojas? Neniam vi
kutimis sidadi en la kamero. Kio okazis
al vi?

— Ho, malgranda museto, mi estas ege malĝoja, se
ĝis mateno mi ne kaptos vin mia dommastrino forpelos
min. Kiom bonege mi vivis apud la varma forno!

— Se vi volas, mi volonte helpos al vi.

— Ĉu vi? — ekmiris la kato. — Mia dommastrino
deziras, ke mi kaptu vin.

— Pro tio ne ĉagrenu! Se ĉiutage donacos al mi
kolbason, tiam mi kun miaj fratetoj kaŝiĝos kaj la
maljunulino kredos, ke vi kaptis nin.

La ideo plaĉis al la kato. Verdire ĝi ne suspektis, ke
la malgranda muso trompos ĝin. Ĝi kontente ekdormis
kaj atendis la matenon.

Dume la malgranda muso invitis al la kamero ĉiun
cincanton, kiu estis en la vilaĝo kaj ili faris grandan
festenon en la nutraĵkamaro. Ili manĝis ĉion lasante



>>>



1	2	3	4	5
6				
7			8	
9		10		
11				

Horizontale

1. Severe, pike; 6. ___ tagon !; 7. Komencas sillabo de Odro; 8. G; 9. Estas bemolo aŭ dieso (akuzativo); 11. La sumera diino de seksa amo, fekundeco kaj milito.

Vertikale

1. Subskribi, monoferi; 2. Leĝaron, cifron; 3. Mallongigo de Unuiĝintaj Nacioj; 4. Bonan ___ !; 5. En la helena mitologio nimfo el Troado, filino de rivera dio Kebreno; 10. Simbolo por tantalo je kemio.

1	2	3	4	5
6				
7			8	
9		10		
11				

Horizontale

1. Heroa, grandioza; 6. Bonfartus; 7. Nacia domajno de la alta nivelo de Taĝikio; 8. Simbolo por plateno je kemio; 9. Inter martelo kaj amboso; 11. Modere trinkanta kaj manĝanta.

Vertikale

1. Esti (preterito); 2. Laŭ la greka mitologio, estis dio de la paŝtistoj; 3. Mallongigo de Ontario; 4. Sub (kontraŭo); 5. Kometo estas malgranda ___ korpo; 10. Simbolo por terbio je kemio.

1	2	3	4	5
6				
7			8	
9				
10				11

Horizontale

1. ___ nia, kiu estas en la ĉielo; 6. Patro nia, kiu ___ en la ĉielo; 7. Konsonantoj de roko; 8. Konsonantoj de ostoj; 9. Patro nia, kiu estas en la ___; 10. Vokaloj de modo; 11. Simbolo por indio je kemio.

Vertikale

1. Franca historia kaj politika regiono; 2. Komputila kodo; 3. Konsonantoj de tuto; 4. Klaki, brueti; 5. Estas parto de skeleto (akuzativo).

Fonto: Semajno de Enigmoj #1

<http://>

www.semajnodeenigmoj.com

(La solvoj troviĝas en la lasta paĝo)



nur unu kolbaseton, kion ili metis antaŭ la dormantan katon.

La nutraĵkamero estis prirabita. Ĝis la lasta ero la musoj manĝis ĉion.

La kato vekigante ne rimarkis, kio okazis. La ĝojo blindigis ĝin, eĉ ĝi ne rimarkis la kolbason antaŭ ĝi. Eble ĝi pensis duondormante, ke la dommastrino donacis ĝin al sia ŝatata kato.

Ankaŭ la maljunulino estis scivola pri kiel la kato laboris? Ĉu la musoj malaperis el la nutraĵkamero.

Estis profunda silento. Ŝi ne aŭdis cincadon, kiel en la antaŭaj tagoj. Ŝi malfermis la pordon kaj ŝi preskaŭ svenis ekvidante la dormantan katon kun kolbaso.

La maljunulino tre koleriĝis. El la nutraĵkamero malaperis ĉio. Certe la kato manĝis ĉiom da kolbasoj, lardoj, fromaĝoj ktp.

Ĉe la pordo de la kamero ĝuste estis balailo. La maljunulino kaptis ĝin kaj komencis bategi la surpriziĝantan katon, kiu tuj eksaltis kaj eble ankaŭ nun ĝi kuras, se intertempe ĝiaj piedoj ne foruziĝis.

Jen la fin', eta porkido portu ĝin!

verkis **Apáti Kovács Béla**, el Hungario

La “sekreta malvirto” de Tolkien

La fama Brita aŭtoro J.R.R. Tolkien (1892– 1973) havis “sekretan malvirton” kiu ĉesis esti sekreta en 1936, kiam li aperigis eseon ĝuste tiel titolitan: *A secret vice*. Ĝi estis ofte represita.



Lia malvirto estis inventadi lingvojn. Jam tre junaĝe Tolkien lude kreis kun siaj kuzinoj sekretajn lingvojn, kiel faras multaj infanoj; sed dum liaj kuzinoj estis normalaj infanoj kaj

ĉesis interesiĝi, li daŭrigis. Lernado de la Franca kaj de Latino en la lernejo nur plifortigis la ‘malvirton’, kaj tiutempe li eklernis ankaŭ Esperanton. 17-jara li uzis ĝin por 16-paĝa manuskripto skribita en “privata skolta kodo”, do iel duoble ĉifrita.

Tolkien havis tute aliajn celojn kreante siajn lingvojn ol Zamenhof. La lingvoj inventitaj de Tolkien estas parolataj en inventitaj mondoj kaj sekve povas havi longajn, inventitajn historiojn, komplekseajn gramatikojn kaj multajn dialektojn. Ili estas parolataj de ne vere homaj estaĵoj kaj ĉiu havas sian unikan skribsistemon. Li volis ilin belaj, ne facilaj. La vortoj devis iel harmonii kun siaj signifoj kaj ne devis simili al vortoj en konataj lingvoj (kvankam kelkfoje evidentiĝas ke li studis la Finnan kaj la Kimran – unu, Sindarin, eĉ estas gramatike bazita sur la Kimra).




Diverslingvaj priskriboj de kelkaj el la Tolkien-aj lingvoj

Tio tamen neniel signifas ke al Tolkien malplaĉis Esperanto. En *A secret vice* li skribis: “Mi ŝatas ankaŭ precipe Esperanton, nelaste ĉar ĝi origine estas kreitaĵo de unu sola homo, ne lingvisto, kaj do iusence homa lingvo senigita pri la malkonvenaĵoj kaŭzitaj de troo da kuiristoj”. Jam en 1930 li estis petita fariĝi

-- el revuo "Esperanto en Danio"

honora konsultisto al la Brita Esperanto-Asocio, kaj en sia akcepta letero (presita en 1932) li skribis interalie unu ofte citotan frazon: “Mia konsilo al ĉiuj, kiuj havas la tempon aŭ inklinon okupiĝi pri la movado de internacia lingvo, estus la jena: ‘Subtenu Esperanton lojale’.” Tio ankaŭ estas aludo al Ido kaj aliaj projektoj, kiuj tiutempe ankoraŭ iomete rolis en la publika imago.



Post la dua mondmilito la Esperantomovado urĝe bezonis pravi sian seriozecon, do oni tenis iom da respekta distanco al la lingvokreema Tolkien. Certe ankaŭ ne helpis ke Tolkien, estante politike iom naiva Katoliko, subtenis Franco en la Hispana civila milito, ĉar partoj de la kontraŭa flanko povis esti sufiĉe kruela al eklezianoj.

Ĝenerale, tamen, Tolkien ne tenis tiel strangajn aŭ ŝokajn vidpunktojn ke ne pardonus ilin paso de kelka tempo. En 1997 aperis Esperanta versio de lia tri-voluma *La mastro de l’ ringoj*. Tradukis ĝin William Auld, kiu kunlabore kun Christopher Gledhill tradukis ankaŭ *La hobito*: aŭ tien kaj reen, eldonita en 2000. Ĉi tiu artikolo estas bazita sur studo pri Tolkien, gastigata ĉe la retejo de la Brita nacia biblioteko, kies aŭtoro (la konata itala Esperantisto Renato Corsetti) eĉ suplementas la Tolkien-an “Subtenu Esperanton lojale” per “Ĝuu Sindarin plene”.

Fonto: revuo “**Esperanto en Danio**”, 25-a jarkolekto • n-ro 1 • februaro 2018

Mi estas legema. Mi ĉiam legas, eĉ atentante aŭtobuson aŭ renkontiĝon. Kompare kun antikvaj ĉinoj, kiuj kunportis libron faritan per bambuaj pecoj, mi estas feliĉa kun la malpeza papera libro.



Libro de bamboaj pecoj en antikva Ĉinio

La disvolviĝo de scienco kaj tekniko pli faciligas la legadon. Poŝtelefonoj, elektronikaj legiloj kaj aliaj elektronikaj epikaĵoj kun malgranda ekrano, kiujn oni povas facile kunporti kaj preni per unu mano, kapablas enteni pli ol mil librojn! En la reto estas multaj senpagaj aŭ malmulte-kostaj legaĵoj, kiujn oni povas elŝuti kaj legi per porteblaj elektronikaj epikaĵoj.

Sed estas bedaŭrinde, ke esperantistoj iras tre malproksime post la tekniko.

Temante la elektronikan libron, esperantistoj konsideras antaŭ ĉio nur la formon PDF. En la reto preskaŭ ĉiuj libroj kaj gazetoj en Esperanto estas de la PDF-formo.

La formo PDF aperis antaŭ pli ol 20 jaroj, kiam ankoraŭ ne estis epikaĵo kun malgranda ekrano, kiun oni povis enpoŝe porti kaj per kiu oni povis legi.

Libroj aŭ gazetoj en PDF-formo estas tre belaj kaj aspektas kiel veraj paperaj legaĵoj en la komputilo aŭ tabula komputilo. Sed legado dum longa tempo sidi antaŭ komputilo estas granda turmento al la korpo, kaj tabula komputilo ne estas tiel oportune portebla kiel poŝtelefono. La poŝtelefono kaj elektronika legilo estas pli oportunaj por legi iam ajn kaj ie ajn.

Apud papera eldono, UEA aperigas la revuon "esperanto" ankaŭ en PDF-formo. Sed mi neniam tra-legas ĝin. Ĉar la PDF-formo havas gravan mankon: en la malgranda ekrano, ĝi ne povas faldi la longan linion kaj ne povas denove komposti la paĝon. Legante librojn en malgranda ekrano, la leganto devas tiri la paĝon dekstre maldekstren, kaj inverse foje refoje. Kvankam estas programoj, kiuj povas denove komposti la paĝon, tamen ili ofte konfuzas la paragrafon kaj paĝon.

Fakte nun jam aperas nemalmultaj formoj de elektroina legaĵo, kiuj estas oportunaj por legiĝi per malgranda ekrano.

La plej simpla formo estas txt, kiu enhavas nur tekston, sen formulo, sen bildo kaj tabelo, sed ĝi povas esti bone rekte legita en ĉiuj komputiloj, poŝtelefonoj kaj elektronikaj legiloj. Dissendante novelojn, romanojn, poemarojn aŭ lernolibrojn, oni povas elekti tiun formon, por ke viaj verkaĵoj povas trafi pli multajn legantojn.



Rakontoj

Tri oraj pomoj

En usona monta loko okazas ĉiujare kurado fama, ĉar ĝi estas testo de kurado. Oni devas kuri senĉese dum pli ol kvardek horoj. Tial multaj spektantoj rigardas la kurantojn kaj krucele provas diveni, kiu sportulo haltos antaŭ la fino. Mia ĵurnalo sendis min por verki artikolon. Mi mallonge intervjuis multajn personojn. Finfine mi alparolis junulon, kiu finis la kuradon inter la lastaj. Li estis nigra, granda, maldika, kun longegaj kruroj kaj mallarĝa vizaĝo. Kiel ĉiujn kurintojn, mi demandis lin, kial li partoprenis la kuradon. „Por edziĝi”, li respondis.

Tian respondon mi ne antaŭvidis. Ĵurnalistoj estas scivolaj homoj. Ankaŭ

La malsamaj aspektoj de la du formoj en la sama poŝtelefono

RAKONTO

TRI ORAJ PO

En usona monta loko okazas ĉiujare kurado fama, ĉar ĝi estas testo de kurado. Oni devas kuri senĉese dum pli ol kvardek horoj. Tial multaj spektantoj rigardas la kurantojn kaj krucele provas diveni, kiu sportulo haltos antaŭ la fino. Mia ĵurnalo sendis min por verki artikolon. Mi mallonge intervjuis multajn personojn. Finfine mi alparolis junulon, kiu finis la kuradon

Se vi dissendas gazetojn kun fotoj, aŭ lernolibrojn kun tabeloj, eĉ sonoj, vi povas elekti la formon Epub.

Epub estas malferma normo. Ĉiu povas fari librojn en tiu formo per senpagaj programoj. Epub-libro estas legebla per komputilo, tabula komputilo, poŝtelefono kaj elektronikaj legiloj.

Epub kaj TXT povas aŭtomate denove komposti la paĝon laŭ la grandeco de la ekrano, kaj montras la kompletan frazon en malgranda ekrano. Plue, tiuj du formoj ankaŭ povas facile ŝanĝiĝi al aliaj formoj, ekzemple mobi, doc, docx, rtf, azw, chm, PDF ktp. Fakte ĉiuj superaj formoj povas tran-formiĝi inter si.

Aktuale, laŭ mia scio, inter la famaj esperantaj gazetoj, nur la "Monato" kaj "La Ondo de Esperanto" havas version Epub.

PDF bone funkcias en la komputila ekrano, sed ĝi estas ne oportuna en malgrandaj ekranoj de la aktualaj modernaj epikaĵoj pro la malfacila legado. Farante elektronikajn librojn aŭ gazetojn, oni devas konsideri unue la leg-eblecon antaŭ la aspektan belecon.

Fonto: <http://reto.cn/php/esperanto/pdf-libro-bela-sed-ne-oportuna/>

Ekde sia renaskiĝo La Ondo ĉiujare publikigas statistikon de la libroproduktado en Esperantujo, daŭrigante la iniciaton de Vilmos Benczik, kiun li komencis en la legenda (kaj leg-enda) Budapeŝta revuo Hungara Vivo. Por tiuj, kiuj unuafoje abonas La Ondon, ni ripetu kelkajn enkondukajn frazojn, kiujn povas ne legi niaj konstantaj abonantoj.



La bazo de ĉi tiu statistiko estas la rubriko "Laste aperis" en la revuo Esperanto, en kiu estas registritaj ĉiuj libroj, kiujn la libroservo de UEA ekvendis en la aktuala jaro (= abonjaro de la revuo

Esperanto, de la 1a ĝis la 12a numeroj). La jartabelojn akompanas resumaj tabeloj por la jam 27-jara periodo de nia statistikado.

Tia statistiko ja estas kritikebla.

Unue, en "Laste aperis" estas menciataj pluraj libroj, eldonitaj antaŭ kelkaj jaroj sed ekvenditaj de UEA en la koncerna jaro, ekzemple, ĉar la eldoninto ne sendis specimenon al Roterdamo. Tio povas doni misan bildon pri la revuata jaro. Sed la resuma statistiko glatigas la fluktuaĵojn kaj fidele vidigas la ĉefajn tendencojn en nia eldonado.

Due, la libroservo de UEA vendas ne ĉiujn novajn Esperanto-librojn, kaj en "Laste aperis" kutime mankas, ekzemple, lerniloj eldonitaj por landaj bezonoj (ekzemple, lernolibroj por ĉinoj) kaj malmultekzemplere eldonitaj broŝuroj, kiujn la aŭtoroj disvendas kaj disdonacas en siaj kluboj aŭ lokaj renkontiĝoj. Same mankas en "Laste aperis" kongreslibroj, programbroŝuroj kaj jarlibroj, kiuj abunde aperas ne por vendado en libroservoj, sed por disdono al la respektivaj kongresanoj kaj asocioj.

Trie, ekster la statistiko restas la bitlibroj, kiujn la aŭtoroj (kutime, senpage) ofertas en la virtuala mondo sen zorgi pri papera eldono por ne pagi la eldonkostojn. Tio reduktas la rikolton de libroj paperaj. Sed ne estas pli granda statistika bazo ol la kritikebla, sed ne kritikenda "Laste aperis".

Kiom da monatoj estas en la jaro?

La statistiko montras, ke dum la lasta jardeko de la 20a jarcento averaĝe aperis 210 libroj, dum la unua jardeko de la 21a jarcento la jara averaĝo estis 191 libroj, kaj en la komencaj sep jaroj de la nuna jardeko (2011-17) "laste aperis" 1110 libroj, aŭ nur 158 libroj jare.

Jaro	Libroj	Paĝoj	Jaro	Libroj	Paĝoj
1991	222	26.091	2004	183	27.295
1992	205	25.789	2005	159	23.780
1993	136	18.511	2006	204	30.078
1994	188	22.078	2007	184	31.183
1995	200	23.345	2008	158	25.381
1996	232	28.637	2009	158	24.272
1997	273	27.727	2010	204	28.232
1998	208	28.769	2011	172	19.775
1999	208	24.460	2012	153	23.144
2000	235	25.869	2013	178	25.344
2001	222	31.520	2014	107	14.024
2002	174	26.451	2015	172	25.629
2003	224	28.424	2016	189	32.323
			2017	139	23.353

La 2016a jaro estis "grasa" kun rekorda paĝonombro, neniam atingita en la antaŭaj 25 jaroj. Tiu kresko okazis ne laste pro tio, ke la jarkolekto 2016 de la revuo Esperanto kompletiĝis ne novembrofine, sed nur en februaro, ĝi kovris ne 12 monatojn sed pli ol 14. Pro la reakuratigo de la aperitmo la jarkolekto 2017 pretiĝis dum nur 10 monatoj, kaj, nature, la 10-monata jaro 2017 estis multe pli magra ol la 14-monata jaro 2016. Dum ĉi tiu stumpa jaro aperis nur 139 libroj, notinde ampleksaj (je 33 paĝoj pli ol averaĝe), inter kiuj nur 13 (malpli ol dekonon) estis broŝuroj malpli ol 49-paĝaj.

La tema distribuo en la pasinta jaro (= jarkolekto 2017) estis kutima.

	1991-2015	2016	2017	1991-2017 Sume aŭ averaĝe
Nombro de libroj en/pri Eo	4802	189	139	5130
Suma paĝonombro	635.808	32.323	23.353	691.474
Nombro de la eldonintoj	1162	75	64	1202
Averaĝa paĝonombro de unu libro	132	171	168	135
Averaĝa prezo de unu libro (eŭroj)	10,00	12,84	13,01	10,19
E-lirrolibro, vortaraj k. s.	699	20	26	745
Originala beletro	562	30	15	607
Traduka beletro	997	28	32	1057
Lingvistiko, esperantologio	555	23	14	592
Eo: historio, movado, kulturo k. s.	639	28	17	684
Politiko, historio, filozofio, socio	513	34	26	573
Scienco kaj tekniko	294	5	1	300
Religio	235	14	5	354
Aliaj temoj	308	7	3	318

Ĉampano por Lutermano!

En ok el la naŭ lastaj jaroj la plej aktiva Esperanto-eldonejo estis MAS (Monda Asembleo Socia),

Leo Trocko
1917
La instruoj de la
Oktoobra Revolucio
(1924)

Monda Asembleo Socia (MAS)

prizorgata de Vilhelmo Lutermano, kiu eldonas plejparte verkojn de maldekstraj aŭtoroj kaj beletron. MAS ankaŭ ĉi-foje plej altas kun 23 libroj – pli multe ol kune produktis Mondial kaj Dokumenta Esperanto-Centro, kiuj sekvas en la plejlisto.

Ĉi tiu kvanta dominado reliefigis ankaŭ

2017. Libroj		2017. Paĝoj	
MAS (Francio)	23	MAS	4237
DEC (Kroatio)	10	Mondial	1935
Mondial (USA)	10	DEC	1753
Horizonto (Japanio)	6	Fonto	1084
J. Drahotová (Ĉeĥio)	5	KAVA-PECH	894
KAVA-PECH (Ĉeĥio)	5	Horizonto	735
Fonto (Brazilo), Impeto (Ruslando)	4	Orion art (Serbio)	664
L. Gbadamassi (Benino)	4	KEA (Koreio)	619
La Blanchetière (Francio)	4	Aracne (Italio)	562

kvalite. Aldoninte 23 librojn, MAS rompita la multjaran "hegemonion" de UEA kaj finfine okupis la unuan lokon en la resuma listo. Samtempe MAS devancis Flandran Esperanto-Ligon kaj iĝis la unua ankaŭ laŭ la suma paĝokvanto. Estas aparte atentinde, ke MAS eldonis 166 librojn dum nur dek jaroj, dum UEA kaj FEL eldonas seninterrompe dum 27 jaroj.

1991-2017. Libroj		1991-2017. Paĝoj	
MAS	166	MAS	23912
UEA	163	FEL	23467
Libro-Mondo	145	Mondial	23201
FEL	129	Fonto	21156
Fonto	126	UEA	20042
Impeto	117	Libro-Mondo	19838
Edition Iltis (Germanio)	116	Impeto	18461
Mondial	112	KAVA-PECH	16592
KAVA-PECH	97	Sezonoj	13898
Sezonoj (Ruslando)	86	AEP (Svislando)	12789

Malsensacio: dominas Francio

2017. Libroj		2017. Paĝoj	
Francio	30	Francio	4585
Japanio	16	Kroatio	2482
Kroatio	15	Japanio	2058
Ĉeĥio	10	Usono	1935
Usono	10	Ĉeĥio	1398
Nederlando	8	Nederlando	137
Brazilo, Koreio	6	Brazilo	1340
Ruslando	5	Koreio	1301
Benino, Hispanio	4	Italio	888
Pollando	4	Serbio	664

Jam la dek-unuan sinsekvan jaron Francio estas plej alte en la laŭlanda listo. Sole MAS sufiĉus por devanci iun ajn alian landon.

Francio

avangardas ankaŭ en la resuma listo por 27 jaroj. Germanio, kiu ĝis 2009 estis la unua, daŭre malprogresas – pro la ĉeso de Iltis pasint-aperis nur du libroj, dum en 1991-2015

ĉiam aperis pli ol dek.

Pri lingvoj kaj aŭtoroj

Preskaŭ duono da libroj (65), eldonitaj en 2017, estas tradukoj. Inter la 17 fontolingvoj la plej populara estas la germana, el kiu estas esperantigitaj 15 libroj; sekvas la franca (7), rusa (5), hispana, japana, kroata kaj pola (po 4). El Esperanto tradukiĝis naŭ libroj. La germana firmigis sian pozicion en la listo de la fontolingvoj.

Pasintjare surmerkatiĝis 13 libroj tradukitaj de la nelacigebla Vilhelmo Lutermano – 81-jara germano, longe loĝinta en Francio, kie funkcias lia eldonejo MAS, kaj de 2002 loĝanta kun sia familio en Kubo. Danke al liaj tradukoj inter la plej popularaj aŭtoroj estas la ruslanda revoluciulo Leo Trocko kun kvar libroj (nature, Lutermano tradukis ilin el la germana); krome aperis po kvar libroj de la beninano Latifou Gbadamassi kaj de la japano Hori Jasuo, kiuj mem eldonis siajn verkojn – ĉi tiuj kvar estas do la plej multe eldonitaj aŭtoroj de la jaro.

Feliĉe, mi ne devas diri ion pri la literatura valoro de la libroj mem, ĉar tion volontule faris Paweł Fischer-Kotowski, kiun mi gratulas pro la bonega revuado!

verkis Aleksander Korĵenkov

Fonto: La Balta Ondo <http://sezonoj.ru/2018/03/knigi-2>

1991-2017. Libroj	
Francio	657
Germanio	458
Pollando	353
Nederlando	329
Ruslando	297
Japanio	286
Brazilo	284
USA	258
Italio	193
Belgio	168

1991-2017. Paĝoj	
Francio	72809
Germanio	53648
Japanio	48652
Ruslando	44010
Brazilo	43821
Pollando	41370
Nederlando	37954
USA	35234
Italio	28792
Belgio	28248

Germana	238
Franca	203
Angla	157
Rusa	103
Pola	75
Portugala	68
Japana	64
Hispana	59
Itala	59
Ĉina	57

La Tero estas tiom antikva ke imagi kiam specifaj aferoj okazis povas esti malfacila. Ĉio iĝas pli komprenebla tamen, se oni komparas la aĝon de la Tero al unuo de tempo, kiun oni uzas ĉiutage. Multaj ŝanĝiĝoj en la historio de la Tero okazis tre malrapide, do la specifaj nombroj multe dependas de la fonto kiun oni uzas, sed ĝenerale, la historio de la Tero aspektus jene se oni komparas ĝin al unu kalendara jaro:

La 1an de januaro, la Tero formiĝas el la restaĵoj de la naskiĝo de la sunsistemo. Ne daŭras longe ĝis ankaŭ la Luno formiĝas kaj la du komencas malrapide malvarmiĝi. Oni ne certas pri kiam la unuaj vivaĵoj kreiĝis, sed verŝajne tio okazis ĉirkaŭ la fino de februaro. Dum monatoj vivo restis simpla kaj unuĉela, ĝis plurĉelaj organismoj ekaperis, kiel la unuaj bestoj ĉirkaŭ la 12a de novembro. La unuaj amfibioj forlasis la akvon ĉirkaŭ la 1a de decembro kaj mamuloj ekaperis la 12an de decembro. Nur du semajnoj post tio, la 25an de decembro, la dinosaŭroj formortas, kune kun granda parto el la aliaj specioj. Nenio kio eĉ similas al homo ekzistas ĝis la 30a de decembro ĉirkaŭ la 8a vespere. Modernaj homoj komencas sian vojon ses minutojn antaŭ novjaro je 23:54 kaj konstruas la Piramidon de Keopso je 23:59:42. Dum la lasta sekundo la unua homo paŝas sur la Lunon, la interreto kreiĝis kaj ĉiu kiu ĉi-momente vivas naskiĝis.



^ Ĉi tiu figuro montras kiel vivo kiel oni konas ĝin estas tre juna kompare al la Tero.

Iĝas klare ke homa historio estas nenio kompare kun la 4,5 miliardoj da jaroj dum kiuj la Tero ekzistis. Tio donas problemon tamen, ĉar kvankam oni notis eĉ ĉiun vorton, kiu estis dirita dum la misioj al la Luno, neniu estis tie por noti kiam la kontinentoj disiĝis, aŭ kiam la oceanoj kreiĝis. Feliĉe geologoj kaj

paleontologoj elpensis multajn manierojn por mezuri la aĝon de rokoj kaj ofte povas uzi plurajn teĥnikojn samtempe por esti certaj. Tio estas ne nur tre interesa, sed ankaŭ gravega por ĉiaj sciencoj, kiuj havas demandojn pri la historio de io malnova.

Signifo de la pozicio de la roko

Eble la plej kerna principo en geologia tempo estas la ideo ke pli profundaj rokoj estas pli aĝaj. Ĝenerale kiam novaj tavoloj da roko kreiĝas, tio okazas super malpli novaj rokoj. Esceptoj nur okazas kiam tutaj tavoloj kliniĝas pro tektonikaj kialoj. Ankaŭ per tre precize rigardi la limojn inter du malsamaj tavoloj, oni povas lerni pli detalajn informojn pri la historio de la rokoj. Se ekzemple du malsamaj specoj de roko renkontiĝas, sed dum unu estas ŝirita, la alia ne estas damaĝita kaj eĉ plenigas la ŝiron, tiam oni povas memfide diri ke la ŝirita tavolo estas pli maljuna. Tio estas la principo de tranĉantaj rilatoj. Ĉi tiuj principoj povas esti uzataj por kompari la aĝojn de rokoj relative, sed ne donas absolutajn valorojn. Kiam oni eltrovis la aĝon de specifa roko per alia metodo tamen, oni povas uzi la sinsekvon de tavoloj por diveni la aĝon de aliaj rokoj. Por tio oni povas ankaŭ uzi modelojn pri kiom rapide sedimentoj formiĝas nuntempe, por diveni kiom longe la formiĝo de la tuta tavolo povus daŭri.




^ La ŝiro en tiu ĉi roko trairas ĉiujn tavoloj, do ĉiuj tavoloj formiĝis antaŭ la ŝiriĝo.

Simile al la ideo de tranĉantaj rilatoj, la principo de inkluzivigo priskribas kiel etaj pecoj de ŝtono ene de pli granda roko devas esti pli aĝaj ol la ĉirkaŭa roko. Kompreneble se la ekstera roko formiĝus unue, ĝi devus hazarde krei malplenajn spacojn kaj poste la ŝtonoj devus iel eniri. La alternativo, ke la ŝtonoj jam ekzistis kaj ke la roko formiĝis ĉirkaŭ ili, estas multe pli logika.

Principo de faŭna sinsekvo

La Brito William Smith, kiu laboris en la karbminada kaj kanalkonstrua industrioj dum la fino de la 18a jarcento, rimarkis ion interesan pri la rokoj kun kiuj li laboris. Pro tio ke malsamaj fosilioj troviĝis en malsamaj rokoj, li kapablis ligi rokojn de la sama aĝo laŭ la fosilioj. La koncepto ke malsamaj organismoj vivis dum malsamaj periodoj estas la principo de faŭna sinsekvo kaj Smith uzis ĝin por sia geologia mapo de Anglio kaj Kimrio, kiu publikiĝis en 1815. La mapo montris rokojn el diversaj periodoj en la ĝusta sinsekvo, sed ne enhavis ajnajn datojn. Por tiuj informoj necesis iloj kiuj tiutempe ne estis akireblaj. La laboro de Smith ankaŭ instigis geologojn al elpensi nomojn por geologiaj periodoj. Ĝenerale tiaj nomoj baziĝas sur loko kie rokoj el tiu tempo troviĝas. Ekzemplo de tio estas la Kambrio, kies nomo venas de la Latina vorto por Kimrio. Alternative, geologiaj periodoj povas esti nomataj laŭ la speco de rokoj, kiu tiam ofte kreiĝis. Ekzemplo de tio estas la Kretaceo, kies nomo devenas de la Latina vorto por kreto. Hodiaŭ ekzistas tiom forta ligo inter paleontologio kaj geologio, ke la du estas apenaŭ distireblaj. Oni povas uzi la fosiliojn de oftaj bestoj kiuj vivis ĉie surmonde kaj kompari ilian aĝon al tiuj de la rokoj. Pli specife oni povas uzi ekzemple amonitojn, kiuj kiel grupo ekzistis dum longega tempo, sed la apartaj specioj vivis nur dum mallongaj intervaloj kaj facile rekoneblas laŭ la ŝelo. Tiel ĉiu periodo povas havi siajn proprajn gvidfosiliojn.




Izotopoj

Por mezuri la absolutan aĝon de roko, oni uzas la specialajn kvalitojn de radioaktivaj izotopoj. Ĥemiaj elementoj havas malsamajn izotopojn. Tiuj estas

atomoj de la sama elemento, kiuj havas malsamajn masojn. Multaj pli pezaj izotopoj estas radioaktivaj, kio signifas ke la atomkerno elsendas radion kaj transformiĝas de malstabila izotopo de unu elemento al pli stabila izotopo de alia elemento. Tio okazas hazarde, do oni neniam scias kiu ekzakta atomo transformiĝos, sed kiam oni havas sufiĉe multajn atomojn, oni povas statistike priskribi la tuton. Esenca al la mezurado de aĝoj estas la duoniĝa tempo. Tiu valoro estas konata por malsamaj izotopoj kaj priskribas kiom da tempo oni bezonas por transformi duonon el la origina izotopo al alia elemento. Dependente de la izotopo, duoniĝaj tempoj povas esti malpli ol sekundo, aŭ miliardoj da jaroj. Se oni do povas kompari la koncentritecon de la origina elemento al tiu de la produkto, oni scias kiom da duoniĝaj tempoj la roko travivis kaj do la aĝon. Tre populara al geologoj estas K40, kiu iĝas Ar40 kun duoniĝa tempo de 1,3 miliardoj da jaroj. Por uzi ĉi tiun teĥnikon estas du gravaj kondiĉoj, nome ke la roko enhavu mineralon el kalio kaj ke ĝi estu magmorokaĵo. Aliaj rokoj ofte enhavas etajn rokojn ene kiuj ĉiuj havas sian propran aĝon. Per uzi magmorokaĵon, oni certas ke ĉiu parto havas la saman aĝon kaj ke la horloĝo rekomenciĝis de 0, pro tio ke la rokoj formiĝas tiel, ke enestas neniu Ar40. Alia tre populara izotopo estas C14. Tiu izotopo estas tre taŭga por relative junaj rokoj, kiuj kreiĝis antaŭ malpli ol 60 000 jaroj. Por ĉi tiu teĥniko necesas biologia materialo kiel parto de osto aŭ ligno. Pro tio ke la koncentriteco de C14 en la korpo restas konstanta dum oni vivas, oni povas mezuri per ĉi tiu teĥniko kiam la arbo aŭ besto mortis. Ĉi tiu teĥniko estas tre utila por junaj trovaĵoj, ekzemple la ostoj de mamuto, sed kompreneble oni ne povas uzi C14 por mezuri la aĝon de dinosaŭro. Feliĉe ĉiu periodo havas proprajn izotopojn kaj ofte oni povas kompari malsamajn izotopojn por esti tute certa.

Magneta kampo

Alternative, unu el la plej interesaj metodoj por pristudi la aĝon de rokoj estas mezuri la magnetan kampon de la roko. Kiam terplatoj disiĝas kaj lafo malmoliĝas sub la malvarma oceano, etaj magnetaj kristaloj povas formiĝi ene de la materio. Dum la lafo ankoraŭ fluas, tiuj kristaloj sekvas la direkton de la magneta kampo same kiel kompasoj, sed kiam la novaj rokoj formiĝas, la kristaloj fiksiĝas kaj ne plu povas turni sin. En ĉiuj rokoj kiuj kreiĝas ĉi tiel hodiaŭ, la norda poluso de la kristaloj estas en la direkto de la norda poluso (kiu estas la suda poluso de la magneta kampo), sed tio ne ĉiam estis tiel. Plurajn fojojn en la



historio de la Tero, la magneta kampo tute inversiĝis en relative mallonga periodo. Se oni do mezuras la direkton de la magnetaj kristaloj, oni povas forstrecki specifajn periodojn el la historio de la tempo kaj uzi aliajn teĥnikojn por trovi eĉ pli precizan rezulton. Ĉi tiu metodo estis inter alie uzita por priskribi la aĝon de malsamaj partoj de la Juan de Fuca-plato apud Usono, kies rokoj havas diversajn aĝojn inter 0 kaj 8 milionoj da jaroj.

Kvankam la geologia tempo do estas multe pli vasta ol oni povas imagi, ne ekzistas kialo por multe dubi la nombrojn. Kompreneble individuaj mezuroj povas esti eraraj, sed la ĝeneralaj teĥnikoj pruvis sin kaj plifortigas unu la alian. Sendube estontecaj eltrovaĵoj ankoraŭ ŝanĝos la bildon kiun oni havas pri la historio de la Tero, kiel okazis antaŭe, sed oni povas certi pri tio, ke ĉi tio estas la ĝusta direkto. Almenaŭ ĉi tiel longdaŭraj procezoj kiel la disiĝo de kontinentoj aŭ evoluo iĝas multe pli kompreneblaj.

Fonto: Blogo Scivolemo

<https://scivolemo.wordpress.com/2018/05/16/kalendaro-el-rokoj/>

< La nigraj strioj en ĉi tiu tempolinio montras kiam la magneta kampo de la Tero havis la saman direkton kiel nun. Periodoj mezuritaj per ĉi tiu skalo havas proprajn nomojn.

Reĝa ordeno por Rob Moerbeek

-- el revuo "Esperanto"

Rob Moerbeek, honora membro de UEA, ricevis nederlandan reĝan Ordenon de Oranje-Nassau. La urbestro de la urbo, en kiu Rob Moerbeek loĝas, Beverwijk, speciale venis al Roterdamo por enmanigi la ordenon kaj gratuli la samurbanon dum la 48-a Malferma Tago de UEA, kiu okazis la 28-an de aprilo 2018.

Rob Moerbeek fariĝis kavaliro de la ordeno pro siaj grandegaj meritoj por la Esperanto-movado en Nederlando kaj tutmonde, kaj ankaŭ pro sia daŭra sindediĉa agado favore al handikapitoj, precipe blinduloj kaj malfortevidantoj. Ekde 2001 li estas Komitatano de UEA, reprezentante Ligon Internacian de Blindaj Esperantistoj (LIBE). Ekde 2004 li estas Honora Membro de ILEI.

Rob Moerbeek estas konata ankaŭ kiel multjara laboranto de la Centra Oficejo de UEA. Nuntempe li okupiĝas pri provlegado kaj lingvokontrolado de pluraj eldonaĵoj kaj periodaĵoj, inkluzive la revuojn Esperanto kaj Kontakto.

Por priskribi ĉiujn meritojn de tiu ĉi homo ne sufiĉos eĉ plurvoluma enciklopedio!

Ĉe YouTube vi povas vidi videon de la ceremonio:

<https://www.youtube.com/watch?v=2viNCD2snwg>

La redakcio de la revuo Esperanto aliĝas al la sinceraĵ gratuloj kaj esperas je plua multjara kunlaboro kun Rob Moerbeek!

Fonto: revuo "Esperanto", #1325 (6), junio 2018, p. 124



Esperanto en Brazilio

53-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO 38-a KONGRESO DE BRAZILA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO

Inter la 31-a de majo kaj la 3-a de junio 2018, en bonega etoso, okazis la 53-a Brazilia Kongreso de Esperanto kaj la 38-a Kongreso de Brazilia Esperantista Junulara Organizo, en la urbo Kuritibo, ŝtato Paraná, Brazilo.



Oni povas diri, ke ĝi estis preskaŭ perfekta evento: densa, riĉenhava kaj bone organizita programo,

dum kiu prezentiĝis serio da bonnivelaĵoj kaj diskutoj pri plej variaj temoj. Belegaj ceremonioj malfermis kaj fermis la kongreson, dum kiuj oni montris plurajn buntajn muzikajn kaj dancajn spektaklojn, fare de la lokaj artistoj. (Tiusence, oni elstarigu la intensan ĉeestadon de neesperantista publiko en parto de la kongresejo, kiu estis publike alirebla!).

La dumkongresaj artaj vesperoj estis eksterordinare altnivelaĵoj: unu el ili, prezento de rafinita "Festa Rekvieto por Priplorinda Mondo" (aŭtoro Jorge Telles, originale en Esperanto); la alia, prezento de esperantigitaj muzikaĵoj fare de moderna ĵazeca ensemblo kaj kanto de la konata Flávio Fonseca. En unu posttagmeza momento, estis spektebla la teatraĵo "Tiradentes", monologo de la veterana Esperantisto

La Imperfekta Tempo

Mi dividas la verbfunkciojn kiel jene:

Ekzistas tri specoj de verbo, nomitaj **M o d a l o**

- 1) Finitivo,
- 2) Infinitivo,
- 3) Participo.

F i n i t i v o .

Ekzistas 3 ĉefaj Tempoj:

- 1) Prezenco (-as),
- 2) Preterito (-is),
- 3) Futuro (-os).

raportis Paulo Sergio Viana, el Brazilio

Amarílio Carvalho, en la publika parto de la kongresejo.

Oni proponis al kongresanoj partoprenon en la ekzamenoj de Komuna Eŭropa Referenckadro (la mondkonataj "KER-Ekzamenoj"), kiun prizorgas edukado.net, kaj aliĝis fakte 24 kandidatoj. Persone akompanis la procedon el Eŭropo la senlaca Katalin Kováts, en kunlaboro kun la brazila respondeca teamo.


Okazis ankaŭ administraj movadaj proceduroj, nome asembleoj de BEL kaj BEJO. En la lasta arta vespero, estis anoncitaj la rezultoj de Literatura Konkurso de BEJO.

Dum la tuta kongreso funkciis bona libroservo. La kongresejo situis en la Universitato UNINTER, kiu simpatias al Esperanto kaj senpage cedis komfortajn ĉambrojn provizitajn per komputilaj projekciiloj kaj bona interreta konekto.

Kurioza programero estis la 1-a Kurado Esperanto por Paco kaj Diverseco, kiun oni bonege organizis en bela natura parko. Ĉeestis ankaŭ multaj neesperantistoj kaj oni abunde informis pri nia lingvo al tiu sportema, energioplena publiko.

La kongreson partoprenis 240 homoj, inter kiuj kelkaj argentinanoj. Oni substreku la partoprenon de 42 gejunuloj.

raportis **Paŭlo Sergio Viana**,
el Brazilio



verkis Marcel Leereveld, el Aŭstralio

Aspektoj.

Ekzistas 7 Aspektoj de ĉiu tempo:

- 1) Komenca (ek-), 2) Imperfekta (-anta; -ata),
- 3) Fina (fin-),
- 4) Ripeta (re-; retro-),
- 5) Daŭra (-adi),
- 6) Perfekta (-inta/-ita),
- 7) Estonteca (-onta/-ota).

LA IMPERFEKTO

En la Angla Ĝi estas en formo de participo ĉiam finiĝanta per la finaĵo -ing (coming, eating). Ĝi plej ofte kombiniĝas kun la helpverbo "to be" por formi la Imperfektan Tempon. En la angla ĝi estas verbo sed



ne indikas tempon, nur nefinitecon aŭ agoparton.

Ekzemploj:

The children were CRYING;
The clothes HANGING outside the window;
The fence is BEING repaired;
While the play will be BEING rehearsed, I'll leave.
While the play was BEING rehearsed, I left;
The clothes seem GETTING dry already.

En la angla la Imperfekta Participo kun “-ing” uzatas ankaŭ en tute alia funkcio, nome por indiki la simplajn tempojn, precipe la Preteriton kaj la Futuron.

En tiu stranga kazo, kie la aliaj eŭropaj lingvoj uzas la Perfekton por la Preterito, tiu Imperfekta Participo nomiĝas “Present Participle”, Prezenca Participo kaj ĝi indikas la tutan agon. Ĝi uzatas kun la helpverbo “to be”. (En Esperanto neniu el tiuj tempaj duobligoj okazas kaj “-anta” kaj “-ata” nur signifas la nefinitecon, Imperfekton).

En Esperanto Pro Zamenhof en Esperanto ne ekzistas verba aspekto imperfekta, nur adjektiva aspekto de imperfekta ago. KAJ en la Aktivo KAJ en la Pasivo. (P.A.G. nomas, malĝuste, la Esperantajn adjektivajn participojn verboj).

Konsekvence la sufiksoj por indiki la imperfektan agon de la radiko estas la adjektivaj “-anta” kaj “-ata”, kiuj indikas en kiu stato situas la Subjekto de la frazo. Tiuj adjektivoj ne indikas tempon (tion faras finiteca verbo), sed nur la (sentempan) nefinitecon de la ago de la radiko. Ekzemploj:

Ili estas (en stato de esti) MANĜANTAJ;
Mi aŭdis ilin KANTANTAJ;
La BATATA hundo bojis;
Restu SIDANTA!;
Ni diskutu SIDANTE;
La hundo ne povos esti SAVATA;
Retrodonu la KRIANTAN infanon al ĝia patrino.
Dum ili estis DORMANTAJ, subite la hundo ekbojis;
Kiam mi estis ESPERANTA ŝian revenon, ŝi alvenis.

Por indiki la tutan agon, de komenco ĝis fino, oni devas uzi unu el la sekvaj finaĵoj:

-as, -is, -os, -i, -us, -u, -atas, -atis, -atos, -ati-, -atus, aŭ -atu.

En la franca. Dum en la neanglaj-ĝermanaj lingvoj oni ne havas specialajn imperfektajn verbojn aŭ verbgrupojn kaj do uzas adverbajn esprimojn por

indiki la imperfekton, la franca havas unu, nur unu, tian imperfekton, nome en la pasinta tempo. Kaj malsame al la angla, tiu imperfekto konsistas el nur unu vorto, verbo. Kaj tio estas plensenca, ĉar la imperfekto uzatas apenaŭ en la futuro kaj tre malofte en la prezenco. Sed la francoj tendencas uzi sian (preteritan) imperfekton malpli kaj malpli. Por la prezenca kaj futura imperfektoj ili povas uzi nur esprimojn kiaj “Je suis en train de réparer mon vélo” (Mi estas riparanta mian biciklon) kaj “A neuf heures je ne pourrai pas partir car ‘a ce temps ma voiture sera en train d’être re’pare’e” (Je la naŭa mi ne povos foriri ĉar tiam mia aŭto estos riparata).

La neanglaj ĝermanaj lingvoj uzas esprimojn kiel la nederlanda “Ik ben aan het eten” (Mi estas je la manĝado) kaj “Hij was bezig (met) zijn fiets te repareren” (Li estis aktivanta ripari sian biciklon).

Fonto: **Australiaj Esperantistoj**, 31/05/2018 #376, pp. 4-5

verkis **Marcel Leereveld**, el Aŭstralio


ESPERANTO
GÜNÜ
26 Temmuz 2018
Adil İletişim

Esperanto öğrenin: www.lernu.net

Diller hakkında: www.lingvo.info
Kavimler arası iletişim hakkında: www.esperanto.net | www.uea.org

"Paĝo 112."
"Kio?"
"Cent dek du."

"Ĉu vere?" - demandas mi kun hezito en la voĉo foliumante la libron.



— El la libro de Daniel Tammet

Jes, tie estas mia nomo: Stela, sociologue... La libron aĉetis mia edzo dum ni pasigis semajnfinojn en Parizo. Li nepre volis viziti librovendejon. Mi surpriziĝis. Mi tute forgesis pri la libro, malgraŭ la longaj intervjuoj, kaj poste mia reciprokita peto: la sukceso intervui Daniel post kiam ni finis la laboron kun mia historio.


Kiam mi ankoraŭ havis mian antaŭan facebook-konton kelkfoje mi skribis denaskajn historietojn. Ili montris kiajn demandojn aŭ reagojn ricevas tiuj personoj kiuj estas denaskaj Esperanto-parolantoj. Kutime amuzaj aferoj okazis/as al mi, ofte mi devas klarigi, ke ja mia vivo kiel denaskulo ekzistas, jes, tio estas vera afero. Kelkfoje okazis interesaj intervjuetoj, babiladoj, sed vere malofte tiaj, kiuj profunde tuŝis min.

Sed se iu mencias al mi iam ajn mian patron tio certe tuj iras al mia koro.

Kiel tio sub mia pasinta blogero okazis. Se oni nur skribas, ke iu ankoraŭ rememoras lin, malgraŭ tio ke li forpasis antaŭ jam 25 jaroj ĉi decembre... tio ĉiam estas ĝojo por mi. Mi tuj havas iun senton de malpezeco kaj pensas: estas homoj, kiuj ankoraŭ scias kiu li estis! Mi ne estas sole! Estas bona ideo ekfari memoraĝon por li, ĉar eĉ post tiom da jaroj estas ankoraŭ homoj, kiuj povus skribi kelkajn historietojn pri li. Ja multe da tempo pasis, kaj mi daŭre aprezus legi ajnajn rakontojn pri li.

Ĉi tie mi volas preni momenton kaj paroli pri tio kia estas kiam Esperantisto forpasas. Tio por mi estis ĉiam alia nivelo de funebro. La unua kiun mi memoras ja estis mia patro... La Esperantistaro estas mia komunumo, mia familio, mia unua penso kiam mi cerbumadas pri mia vivo, kion signifas esti mi. Do, se

Esperantisto forpasas tio estas ĉiam pli granda ŝoko. Eĉ se mi scias, ke ni same mortos kiel ĉiu, ĉu en akcidento, ĉu pro malsano, ĉu post longa vivo. Kvazaŭ mia patro denove mortus iomete. Nuntempe la novaĵoj jam pli rapide atingas nin, kaj kutime ne plu persone de iu ni ekscias kio okazis. Oni legas ie. Do ne estas la eblo kune rememori kaj babiladi pri la forpasinta persono. Plej ofte oni ja eĉ ne povas partopreni en la adiaŭo, ni ja estas dise en la mondo. Mense kune, tamen aparte.



—
Mi volas paŭzi nun por minuto kaj peti vin ankaŭ sendi ampensojn al la familio Ertl, kiuj devis ĝisi sian patrinon pasintsabate. Mi funebras kun vi István, Klára, Ruben kaj Dorián. Mi sendas forton kaj subtenon al via familio en tiuj malfacilaj tempoj.

—
Interese, ke dum la pasinta semajno komencis mi serioze konsideri, ke eventuale mi skribus kelkajn anglalingvajn artikolojn en tiu ĉi blogo. Mi deziras pli bone kompreni kia estas denaskulo, kaj kion tio praktike signifas aŭ ĉefe kreskante signifis en mia vivo. Doni perspektivon. Rakonti pri la movado el vidpunkto, kiu ne ofte aperas en la artikoloj. Jes, ekzistas tiu video, la diskuto en Reddit, kelkaj aliaj mencioj. Ili estas tro simpligaj. Tro bazaj. Kiel ni estas denaskuloj hejme, en la lando kie vi loĝas? En la ĉiu taga vivo? Kio ŝanĝiĝas, kion vi lernas? Ĉu estas strange por aliaj aŭ ne? Ĉu vi havas problemojn pro tio aŭ ne? Kion vi rimarkas kion aliaj ne nepre? Kia estas kiel infano? Kiel plenkreskulo?

Por ni Esperanto ne estas nur lingvo, hobbio, kuriozaĵo. Estas homoj, kies vivon ĝi signifas. Ekzemple la mian. Mi pripensas kiel bone montri tion per diversaj temoj, kaj se vi havas ideojn, demandojn pri kiuj vi volonte legus, do skribu al mi.

—
Videblas, ke tempo pasas, kiam viaj amikoj komencas iĝi gepatroj. Tiam vi jam estas denaskulo de longa tempo! Dum la antaŭpasinta semajnfino mi havis la plezuron gratuli al amikino kaj bonvenigi sian novnaskitan filon al tiu ĉi mondo. Kun ŝi ĉi somere ni konas unu la alian de 25 jaroj. De du kaj



Kun bebeto

duon jardekoj. Mirinde! Ŝi estas tre grava parto de mia juneco, unu el miaj plej karaj konatuloj de la movado. Fakte, ŝi estas tiu pro kiu mi estas konata por multege da homoj kiel Stela. Eble unu el la plej bazaj rakontoj pri mia vivo, kiel mi iĝis Stela, kial estas homoj, kiuj nomas min Eszter? De kio dependas tio? Ja multaj rakontoj komenciĝas per la nomo. Kaj multaj Esperantistoj havas du nomojn pro diversaj – kelkfoje amuzaj – kialoj. Mi ankaŭ. Sed la mia eĉ ligiĝas al la Infana Kongreseto en Hispanio en 1993. Eble iam mi rakontos ĝin...

Sed ĝis tiam, ni festu la vivon, kaj ni ĝoju, ke ni estas parto de la Esperanto-movado! Ke ni havis, havas kaj havos la eblecon sperti kion tiu ĉi komunumo donacas al ni!

Fonto: <https://stelachiamnurkritikas.wordpress.com/2018/01/29/denaskaj-rakontetoj/>

verkis **Stela**

Kelkaj sugestoj por la malliberigotoj

-- poemo de Nazim Hikmet

Ne, ke mi malesperas
Pri la mondo, pri patrujo, pri homoj.
Se oni vin ne pendumos
Sed malliberigos en karcero,
Kaj vi restos interne dum dek aŭ dek kvin jaroj,
Eĉ pli ol tio, ke vi estis kondamnita
Vi neniam diru
"Pli bone estus ke min
Oni pendumus sur poluson kiel flago"

Vi obstiniĝu je vivo.
Eble ĝi ne plu estos feliĉe,
Eble ĝi estos via vivo-ŝuldo,
Ke obstine al via malamiko
Vi vivu unu plian tagon.

Vi eble interne estos sola kun unu parto de vi,
Kiel ŝtono en la fundo de puto.
Sed via alia parto
En la amasiĝon de la mondo
Devas tiel enmiksiĝi,
Ke vi tremetu en karcero,
Se ekstere en kvartaga fora loko tremetos folio.
Atendi leteron en karcero,
Kanti brulvolajn kantojn,
Kaj fiksante viajn okulojn al la plafono
Dolĉa ĝi estas sed danĝera.

Rigardu al via vizaĝo de razado al razado,
Forgesu vian aĝon
Protektu vin kontraŭ pedikoj,
Kaj ankaŭ kontraŭ la printempaj vesperoj;
Kaj plue la panon
Formanĝu ĝis ĝia fina peco,
Kaj neniam forgesu ridi buŝplene,
Kaj plue, kiu scias,
Eble via amatino ne plu amos vin,
Ne diru ke tio ne gravas,
Tio ŝajnas kiel rompiĝo de verda branĉo,

Al tiu kiu restas interne.
Estas malbone pensi pri rozĝardenoj interne,
Sed estas bone pensi pri montoj kaj maroj,
Verki senlace,
Kaj mi ankaŭ sugestas al vi teksadon, ¹
Kaj ankaŭ fari spegulojn. ²
Tio estas, ke interne dum dek jaroj, dek kvin jaroj,
Kaj tempo eĉ pli ol tio,
Ne estas nepasigebla,
Ĝi ja estas pasigebla,
Sufiĉas ke ne malheliĝu
Tiu gemo sub via maldekstra brusto!



^{1, 2} Nazim Hikmet pasis sian tempon en karcero verkante kaj pentrante. Plue kun siaj amikoj li faris spegulojn kaj teksis por enspezi monon.

tradukis **Vasil Kadifeli**,
el Turkujo



Eŭropa Junulara Evento (EJO) estas junulara festo, kiu estas organizata en la Eŭropa Parlamentejo ĉiu jare. Tiu evento estas organizata per la **Eŭropa Junulara Forumo (EJF)**. TEJO estas reprezentata en EJF. Multaj junuloj el diversaj landoj partoprenas en tiu evento. Ĝi estas unu el la plej viglaj eventoj en la Eŭropa Kalendaro kaj estas gvidata de junuloj. La Festivalo kombinas debatojn, laborejojn, diskutojn, ekspoziciojn kaj agadojn por festi kio signifas esti juna en Eŭropo. Junaj eŭropanoj kuniĝas kun mondaj gvidantoj, internacie konataj spertuloj, politikistoj kaj junularaj organizoj por paroli pri diversaj aferoj kaj serĉi verajn solvojn.



Ĉijare la evento okazis en la 1-a kaj 2-a de junio 2018 en Strasburgo. Pli ol 50 naciecoj de ĉiu Membro-Ŝtato en EU, inkluzive de partoprenantoj el Azio, Afriko kaj aliaj partoj de Eŭropo partoprenis la eventon. Estis kvin kernaj temoj:

- Daŭrigado kun la Cifereca Revolucio
- Vivi Starante en Malkvietemaj Tempoj
- Labori por Pli Forta Eŭropo
- Protekti nian Planedon kaj alvoko por Justa Kunhavaĵo

Dum la Festivalo, junaj ideoj estis kolektitaj kaj poste prezentitaj al decidistoj.

Entute 27 TEJO-anoj partoprenis al tiu evento kaj reprezentis TEJO-n. Ni havis nian budon kaj aktivaĵojn:

Lingva Kvizo:

Lingva kvizo pri lingva diverseco en Eŭropo. Estis 20 demandoj el diversaj regionaj kaj naciaj lingvoj. Oni provis malkovri la lingvojn. Se oni sukcesis, oni gajnis kuketon kiel donaco.

Esperanto Kurso:

Okazis "Esperanto 101" kurso. Junuloj interesiĝis en Esperanto kaj alvenis al nia budo en la ĝusta tempo. Samideanoj en nia grupo parolis pri Esperanto, pri nia movado, kaj pri TEJO. Poste oni instruis Esperanton. Mi volas mencii unu interesan okazaĵon: Kiam la evento finiĝis ni foriris kaj prenis tramon. Ni estis interparolantaj esperante dum en la tramo, kiam iu junulo salutis nian grupon kaj diris sian nomon. Ni surpriziĝis kaj kelkaj aliaj diris, ke estis ankaŭ unu alia esperantisto en la tramo. Ni ĉiuj alproksimiĝis kaj ekparolis kun li. Poste, ni eksciis ke li lernis kiel paroli kelkajn vortojn dum nia trejnado. Li ĝojis paroli kun ni esperante.



Senpagaj Kuketoj:

Oni disdonis flugfoliojn, kiuj en la unua flanko havis instrukciojn en regionaj lingvoj. Se oni komprenis tiujn instrukciojn, oni malkovris la lingvon do li gajnis senpagan kuketon. En la alia flanko de la flugfolio estis skribita, ke se oni ne komprenas la lingvojn, tiuj vortoj ne donas kuketojn.

Krom tiuj aktivaĵoj, ni ankaŭ havis liberan tempon. Ni estis registritaj al diversaj aktivaĵoj en la Parlamentejo. Oni povis partopreni en la ferma kaj malferma ceremonioj, al demand-sesioj de la prezidanto de EU-Parlamentejo, al koncertoj, kaj al sesioj pri diversaj temoj.

Mi partoprenis en la ferma kaj malferma ceremonioj. Tiu estis vere bona sperto por ni ĉar ni povis sidi en la seĝoj de la parlamentanoj kaj fari demandojn rekte al Antonio TAJANI, la prezidanto de EU-Parlamentejo. Mi partoprenis en unu sesio kun la itala astronoto Pablo Nespoli. Li estis ege mojosa. Li parolis pri sia sperto en spaco. Li montris 10-minutan videon pri kiam la suno aperas kaj malaperas super la mondo. Mi partoprenis en unu sesio pri la problemo de kapkovrado de islamaj virinoj en eŭropaj landoj. Estis islamaj geparolantoj kiuj subtenis aŭ kontraŭis la kapkovrilon de virinoj. Mi partoprenis ankaŭ en unu lud-sesio en kiu mi lernis kiel jungli kun malgrandaj pilkoj.

La tuto estis ege bona sperto por mi. Kiel kutime, Esperanto denove ebligis al mi malkovri novajn aferojn kaj spertojn.

Io okazas en Zaozhuang Universitato

J Jen kio okazas en Zaozhuang Universitato laŭ la mesaĝoj de karaj Semio kaj Sasaki Teruhito.



Mesaĝo de Semio:

Kun granda ĝojo mi informas ke kvarjara Esperanto-fako de Zaozhuang-a Universitato estas promesita de ĉina Ministerio de Edukado en 21-a de marto, tio signifas post Ĉina Komunika Universitato, kiu kelkaj fojoj havis la fakon de Esperanto troviĝas la dua universitato kun oficiala edukado de Esperanto. Laŭ plano la studentoj de Esperanto por kvarjara studo povos akiri diplomon de bakalaŭro pri literaturo. Por kontentigi la profesion kaj laboron ni instruos Esperanton kaj la anglan en du direktoj nome



komunikado kaj interreta komercado. La Esperanto-fako donos diplomon pri literaturo de Esperanto.

P.S.: Esperantistaj profesoroj, instruistoj, kiuj povos instrui la anglan kaj Esperanton, estas bonvenaj instrui aliajn lingvojn aŭ fakojn kaj estas rekomendotaj al koncernaj fakaj institutoj. En junio la universitato komencos varbi studentojn el la tuta mondo. Al studentoj el



neprogresintaj landoj la universitato donos stipendion. Interesatoj kontaktu kun sinjoro Sun Mingxiao: Semio@163.com.

Mesaĝo de Sasaki Teruhito (instruisto en Zaozhuang-a Universitato, japano):

En Zaozhuang-a Universitato en Ĉinio, estas starigita la departamento de Esperanto. Tio signifas ke ĉi-jare en septembro venos studentoj, ĉefe studentaj Esperanton, samkiel aliaj lingvoj, la japana kaj la angla. Tio estos historia afero. Jam estas planata la enhavo de lekcioj. Necesos instruistoj, bonaj Esperantistoj. Estos invitataj la instruistoj kaj lernantoj el la tuta mondo.

Solvo de la Krucvortenigmoj



E	N	O	N	O
T	A	G	O	N
U	N		T	A
A	K	O	D	O
A	B	O	N	I

A	S	T	R	A
S	U	P	E	R
O	N		T	B
P	A	J	N	O
E	S	T	I	S

O	S	T	O	N
R	A	S	L	I
T	T		E	
A	S	K	I	O
P	E	R	Ĉ	O